


V - 19034/1961

瑞雪豐年
李正人
一九六一年



SPROPOLA L'ÈCINIO

人民中國報道

6

1961



Mu Gujing el "La Fortikajo Muke".



"Ebriigo de la Imperiestra Konkubino Jang".

Brila Arto, Senmorta Figuro
Mej Lanfang sur la Sceno

Baj Suĝen el "La Ponto Duankiaŭ".



"Belulino de Vu-lando Hiŝi".



Sub la Ŝakto

— Vizito al Karbominejo —

SEKVANTE la inĝenieron mi iris laŭ ebena ŝoseo kaj alvenis al la tereno de la karbominejo. Tie ĉe ambaŭ flankoj dense viciĝis arboj, kies folioj superombri la ŝoseon malvarmete. Estis jam somero, cikadoj kantis sur la arbobranĉoj kaj tra la densaj arboj alblovadis freŝa vento, kiu agrable kaj plezure vigligis mian animon. Kiam ni iris pluen, jen antaŭ ni alte leviĝis fera laboro de levmaŝino, kies radegoj, volvitaj per ŝtalkingo, vige turniĝadis. El la ĉirkaŭaj laborejoj disaŭdiĝis tumultaj bruoj. La laboristoj estis okupataj per la ŝarĝado kaj transportado de karbo.

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 6 (71) 1961

Bildo sur la kovrilo — **Neĝo — Aŭguro de Riĉrikolto** (Ĉinstila pentraĵo de Ĝou Juanliang)

Sub la Ŝakto

Vizito al Huahian-a Farmejo de Revenintaj Ĉinaj Elmigrintoj

Lusin kaj V. Eroŝenko

Himno de Nokto

Batalanto kaj Muŝoj

Funebro pri K-do Mej Lanfang — Majstro de Pekina Opero

La Majoro en Trajno

Mi Retrovis Nian Pliagan Franjon

Somero de la Muziko

Arda Prikantanto de l' Nova Vivo

Navigisto Ĝen He

La Muzeo de Lusin en Pekino


"Interrompita Am-songo"

Rakontoj pri Afanti

Ĝong Kuj en la Ĉinaj Pentraĵoj

La Sportoj Ŝatataj de la mongola Popolo

Dugiang-barajo



Larĝa kaj lumigita galerio.

Kaj mi vidis sur ilia haŭto la brilon de la flagranta pulvoro de la "nigra oro".

Nun ni estis subirontaj en ŝakton profundan je 600-700 metroj. Estis por mi la unuan fojon subiri en tiel profundan lokon, kaj mi havis senton novan kaj nekutiman kaj samtempe sentis min iom nervoza. Ni jam ŝanĝis nian veston en kompleto de nigra kotonvatita vesto kaj portis ankaŭ ĝisgenuajn kaŭĉukajn botojn kaj pezan sekuran kaskon. Sur ĉi tiu kasko estis fiksita malgranda elektrolampo kiu lumis lampire sub la suno. En tiu tempo mi ekrememoris la impreson pri karboministoj, kiun mi ricevis el lerno-libro.

Ni alvenis ĉe la randon de la ŝakto ĝuste kiam el ĝi leviĝis karbovagoneto, kiu kun ektorniĝo fluge glitis malsupren laŭ la malgrandaj reloj kaj verŝis la karbon en vagonaron sube atendantan. Kaj eksonoris elektra sonorilo, ni enpaŝis en grandan kaĝon por levado de karbovagoneto, kiu malleviĝis pli rapide ol lifto, kaj tiam la malgrandaj elektrolampoj sur niaj sekuraj kaskoj eklumis brile. Al ni ekblovis malvarmeta vento kaj la somervarmeco, kiun ni kunportis de sur la tero, rapide forperdiĝis.

Alveninte al la fundo mi ege miris ke la subtera mondo estis tiel luma, kaj la aero estis same freŝa kiel

sur la tero, ĉar venton oni enblovigis de la ŝakta aperturo. Antaŭ ni etendiĝis rekta galerio, en kiu estis instalita per vico da brilantaj elektrolampoj. La galerio estis konstruita el betono kaj en ĝi tien kaj reen fluadis trapasantoj kaj karbotransportaj tramoj tiel vigla kiel en foiro. La trapasantoj marŝis kaj interparolis ridante, gaje kaj libere. Kaj je malgrandaj interdistancoj estis postenitaj deĵorantoj kiuj direktis por sekura komunikado la veturilojn kaj trapasantojn, kiel policianoj de komunikado sur la tero. Tion vidinte, tuj malaperis mia antaŭa nervozeco, kiun mi havis kvazaŭ lerneja knabeto antaŭ io nekonata.

“Ĉi tiu minejo jam havas centjaran historion,” diris al mi la inĝeniero, “kaj dum la okupado de la eksterlandaj invadintoj, tiu ĉi galerio ne estis provizita per elektraj lampoj nek fortikigita per betono, tial tre ofte okazis mortakcidentoj pro defalintaj ŝtonoj. Post la Liberiĝo ni ĝin provizis per elektraj lampoj, fortike rekonstruis la galerion kaj provizis ĝin per tramoj. Antaŭe, la transportado de karbo estis plenumata per puŝado de homoj, kiuj, se hazarde iom malrapidis en la streĉa puŝado, tuj ricevis vipadon de la okupantoj. Nun ne nur en la transportado de karbo ni ne plu uzas homan forton, eĉ en la fosado ni aplikas jam akvoborilojn.”

Ja estis necese ke ni portis kaŭĉukajn botojn, ĉar iatempe ni devis vadi en akvo profunda je duona futo. Ni preterpasis direktejon kun tre brilaj lampoj kaj tie ĉe la telefono estis deĵoranto senĉese informiĝanta pri la cirkulado de la tramoj. La inĝeniero aliris kaj petis informon pri la tramo por la loko de nia celo. Poste ni ripozis iomete sidante ĉe malgranda kaverno apud la direktejo kaj baldaŭ aŭdiĝis alveturado de tramo el la direkto de nia deveno.

Ni enpaŝis en la tramon. La brilantaj lampoj en la galerio flugis malantaŭen super niaj kapoj. Pasis preskaŭ duonhoro, kiam ekhaltis la tramo. Ni elpaŝis



el ĝi kaj iris en branĉan galerion, kie la lampoj ne estis tiel densaj kiel en la ĉefgalerio kaj mi rimarkis ke ĝia supra kaj ambaŭ flankoj estis subtenataj per lignaj fostoj kaj dikaj ferladoj, kaj en la interfendoj montriĝis karbotavolo nigre brilanta. Estis aŭdeblaj sonoj de akvo fluado kaj aerpumpado, la aero estis freŝa kaj pura kaj mi sentis min plenenergia. La inĝeniero diris al mi ke ni jam eniris en karbotavolon kaj la distanco de tiu ĉi loko ĝis la enirejo de la ŝakto estis jam tre longa. Ni iris pli antaŭen kaj ĉie vidis nur karbopecojn. La malgranda elektrolampo sur mia sekura kasko lumigis al mi la vojon kaj dank' al ĝia lumo mi esplorante antaŭenpaŝis en la fosajo kaj trovis ke en la profunda tero kaŝiĝas tre riĉa provizo da karbo.

La antaŭenfosata trapasejo fariĝis paŝon post



Supre:
Aŭtomata transporta linio.


Ĉiuj fotoj ilustrantaj la artikolon prezentas Dongŝansakton de Hegang-karbo minejo.

Ministoj.
Olepentraĵo de Lju Hongĵen



Ankaŭ la filo volas fariĝi ministro.

La feliĉa vivo de emeritaj ministoj.



paŝo pli malalta kaj ni estis devigitaj iri kun klinita kapo, sed ĉiam pli belaj antaŭ niaj okuloj sinmontris la "nigra oro". Mi haltis ĉe unu granda karbomuro, kiu estis subtenata de dikaj fostoj, kaj ĝin lumigante per mia elektrolampo mi alrigardis, kaj ju pli mi rigardis, des pli da beleco mi trovis. Sur la profile tranĉita surfaco de la muro pli malpli klare montriĝis en brilo la desegno de la branĉoj, folioj kaj ŝelo de praepokaj arboj. Mi ne deteneble etendis mian manon por ilin palpi, kaj la branĉoj, folioj kaj ŝelo jam fariĝis glata nigra karbo. Mi diris al la inĝeniero:

"Vidu, arbo! Vere bela mondo! Ĝi ŝajne estas primitiva arbaro kiun ankoraŭ neniu historio notis kaj nun ni povas vidi iliajn primitivajn formojn".

Li staris apud mi, gapis por momento kaj laŭde respondis: "Bela! Vere bela! En la primitiva karbotavolo sub la tero estas ofte malkovrataj tiaj strangaj kaj komplete konservataj formoj de kreskajoj, precipe en la loko de dika karbotavolo." Ĝuste en tiu momento, subite aŭdiĝis ekskuo de proksima fosajo. Li klarigis al mi ke tio estas eksplodigo farita per dinamito de la fosantoj. Ni paŝis antaŭen ankoraŭ kelkdek metrojn kaj alvenis al vojkruciĝo kie okulpike brilis lampoj. Tie per ŝtupetaro ni supren iris al la dekliva vojo kaj ekaŭdis plaŭdon de torento. Alveninte en pli ebanan galerion ni ektrovis en lumo de lampoj glitujon, laŭ kiu la akva torento brue puŝegis la karbon, kiu en grandaj blokoj tondre ruliĝis malsupren flugrapide. Tio devas esti la glitujo, kiun menciis la inĝeniero en prezentado de hidraŭlika elfosado de karbo. Kiam ni trapasis alian galerion, ni vidis laboristojn en kontraŭakvaj vestoj manipulis siajn akvoborilojn por debati karbon. La forta elsprucita akvo faligis grandkvante la karbon pecaron post pecaro, kiu malsupren glitis laŭ la glitujo.

Kiam ni venis sur la terosurfacon, la suno jam kliniĝis al la okcidento. Dum 5 horojn ni iris dekkelkajn liojn sub la tero. Ĉe la enirejo de la ŝakto estis kvazaŭ vigla foirejo kaj ĉe la elirejo estis vastaj kampoj. La laborado de la ministoj kaj la bela mondo ĉirkaŭ ili altiris min profunde.

Popola Komunumo Estas Feliĉ-floro

— Popolkanto —

Popola komunumo estas feliĉ-floro,
Ĝi estas kulturita mem de l' Kompartio.
Mil liojn dise fluas ĝia bonodoro.
En ĝia bonodoro granda familio.



Vizito al Huahian-a Farmejo de Revenintaj Ĉinaj Elmigrintoj

Revenintino el Indonezio Ĉeng Jimej kolektas rozojn de la Farmejo.

Foto de Hinhua



DUM la tempo de somera rikoltado en la ore ondanta kamparo, mi venis al la ŝtata Huahian-a Farmejo de Revenintaj Ĉinaj Elmigrintoj, kiu situas ĉe Liuhi-rivero, proksime de Kantono. Estis jam vespero. En grupoj viraj kaj virinaj revenintaj ĉinaj elmigrintoj, portante draŝuojn kaj vektante rizgrenon, iris returne de la kampoj. La serpente ondiĝantan montĉenon sur la fono ankoraŭ lumigis la radioj de la subiranta suno, sed la en vicoj starantaj nove konstruitaj domoj de loĝejoj, fabrikoj, infanejo, kuracejo kaj manĝejo en la densa verda arbombro estis jam vualita de la krepusko. La malvarmeta vento jen kaj jen alportis la aromon de floroj kaj rizo de la proksimaj kampoj kaj ĝardenoj, kaj la ridon kaj babiladon de viglaj junulinoj, kiuj kaŭrante lavis vestojn ĉe la rivereto.

Sed veran belajon de la Farmejo mi perceptis nur kiam mi vizitis la ĉirkaŭantajn kampojn en la

sekvanta tago. Min gvidis juna instruisto de la agrikultura mezlernejo. Ni preterpasis segejon kaj rizprilaborejon, kie senĉese zumadis motoroj, kaj grenejon, kaj venis al la "teritorio" de la Kvara Produkta Brigado kiu situas tuj ĉe la ĝenerala administratejo. Ĉe unu flanko estis ĝardeno de plantidoj de banano, cidonio, kafo kaj piro, kaj legomĝardeno kie kreskis plene faboj, batatoj kaj melopepoj; ĉe la alia estis kampoj de rizo kaj aroma cinodo. Tie kaj ĉi tie viroj kun supren falditaj pantalonuboj kaj virinoj en roboj, svingante falĉilojn, okupiĝis en rikoltado. Skarlataj fruktoj, densaj kiel stelaroj, pendiĝis sur liĉi-arboj* apud kampoj kaj vojoj. Preskaŭ ĉiu el la ananasarboj, plantitaj sur la montdeklivoj, jam portis frukton en "verda kiraso".

Kiu plej multe tiris al si la atenton estis tamen la rozĝardeno, en kiu vasto de verdaĵo estis punktata per ĉarme ruĝaj floroj. Ĉi tie kreskis "bulgara rozo", "hongkong-a rozo" kaj "luogang-a rozo", el kiuj oni povas fari rozbrandon kaj ekstrakti rozesencon. Nun en la ĝardeno floris nur "hongkong-aj rozoj". La juna instruisto kun bedaŭro diris al mi: "Se vi venus en la sezono de florado, tiam ĉi tie estas kvazaŭ vasta maro de floroj!" Kvankam en la Farmejo estas organizita speciala grupo por florkoltado, en pluvaj tagoj dum florado, oni devas krome organizi centojn da farmmembroj por helpi en florkoltado, ĉar en pluvaj tagoj la floroj ekfloras eksterordinare rapide. En la periodo de florado, en duona monato komenciĝanta de 5a aŭ 6a de aprilo

* *Nephelium litchi*.



Loĝejo de la farmejanoj.

Foto de Hinhua



La el Indonezio reveninta Liaŭ Ŝilong (la 3-a de dekstre), kiu nun estas vic-farmejestro de la Ŝtata Farmejo de Juangiang-gubernio, Junnan-provinco, studas kun aliaj pri riz-plantado. Foto de Hinhua

oni rikoltas 1,000 ĝis 1,500 kilogramoj da floroj ĉiutage el la rozĝardenoj okupantaj areon de pli ol 40 hektaroj.

La Farmejo estis establita en 1955 de la Registaro por ke la revenintaj ĉinaj elmigrintoj partoprenu en produktado kaj konstruado. Komence, estis nur tridek ses junaj viroj, kulturis unu monteton post la alia. Tie kie ili ŝvitis, kreskis sinsekve diversaj plantaĵoj. La nombro de revenintaj ĉinaj elmigrintoj kiuj venis al la Farmejo ankaŭ kreskis ĉiujare, kaj sole en la lasta jaro alvenis pli ol 1,200. Nun, laboras pli ol 2,300 homoj en la Farmejo, dividitaj en ses produktaj brigadoj. La Farmejo posedas pli ol 10,000 mu-ojn (aŭ 667 hektarojn) da agro, kaj establis malgrandan aromcinodan ekstraktejon, brikfarejon, alkoholaĵfarejon, kaj rizprilaborejon. Krome, estas ankaŭ abelbreda taĉmento kaj brutbredejo.

Multaj el tiuj ĉi revenintaj ĉinaj elmigrintoj neniam antaŭe okupiĝis pri agrikultura laboro. Sed, instigitaj de sia fervoro por konstrui sian patrion kaj sian feliĉan hejmon, ili rapide ellernis diversajn produktajn teknikojn. Ĉen Zuoliang kaj lia edzino, revenintaj de Indonezio nur lastjare, kiuj antaŭe tenis malgrandan butikon eksterlande por ĉirkaŭ tridek jaroj kaj neniam portis vekton nek prenis sarkilon, nun jam ellernis agrikulturajn laborojn, kiel semselektadon, semadon, rizplantadon, falĉadon ktp. Ĉen Zuoliang kaj lia plej aĝa filo, Ĉen Giejing, eĉ fariĝis vicestroj de produktgrupo.

Li Hongliang, gvidanto de la Kvara Produkta Brigado, estis unu el la tridek ses pioniroj de la Farmejo. En sia infaneco, pro malriĉeco, li devis iri al la Sudaj Maroj kune kun aliaj por serĉi vivrimedon. En 1951, li decidis returni al la hejmlando por par-



Postlabora amuzado de la junaj revenintaj ĉinaj elmigrintoj de la Ŝtata Farmejo de Juangiang-gubernio. Foto de Hinhua

topreni en patrolanda konstruado. Depost la tago kiam li venis al la Farmejo, li estis ĉiam en la antaŭaj vicoj ĉu por plugado, plantado, kanalfosado, vojriparado aŭ dom-konstruado. Ĉirkaŭ dek kilometrojn for de la ĝenerala administrejo, estas montlago formita per digo. Kiam ajn pluvegis, li ĉiam iris tien inspekti, ĉu la digo estas sekura kaj ne kaŭzos katastrofon. Iufoje, vekita de pluvego en noktomezo, li alvokis kelkajn kunulojn kaj kuris al la monto en mallumo; sub la pluvego ili fosis defluejon por ellasi akvon, kaj preventis la disfalon de la digo kaj damaĝon al domoj kaj plantaĵoj. Pro sia edifa, aktiva laborfervoro en ĉiuj aferoj kaj sia zorgemo por la kolektivaj interesoj, en 1957 li estis elektita por ĉeesti la tutlandan kunvenon de la junaj socialismaj aktivuloj de la revenintaj ĉinaj elmigrintoj kaj glore aliĝis al la Komunista Partio.

Multaj estas tiaj patriamaj kaj laboramaj revenintaj ĉinaj elmigrintoj kiuj fervore sin dediĉas al la konstruado de la Farmejo, ankaŭ Huang Mejĝen estas unu inter ili. Li estas la patro de Huang Hajŝeng, kiu naskiĝis sur ŝipo kiun la patrolando sendis por reporti la unuan aron de ĉinaj elmigrintoj en la lasta jaro. Li estis multe tuŝita de la fakto, ke antaŭ ol li surpaŝis la patrolandan teron, lia bebo jam ricevis ĉiujn zorgojn de la patrolando. Tial, post kiam li fariĝis ŝoforo de la Farmejo, li klopodas plenumi ĉian ajn malfacilan taskon kiun oni komisiis al li. Iun aŭtunan vesperon, lastjare, pro daŭra pluvego en sinsekvaj tagoj, la domoj de la Kvina Produkta Brigado estis sub minaco de inundo. La

(Daŭrigo sur p. 267)



Ge Baoĉjuan*:

LUSIN KAJ V. EROŜENKO

POR la ĉinaj legantoj, la nomo de la rusa esperantisto kaj blinda poeto Vasilij Eroŝenko** ja ne estas fremda. Foliumente la novelaron *Kriado* de la granda ĉina verkisto Lusin, ni povas trovi rakonton titolitan per *La Komedio de Anasoj*, kiu komenciĝas jene: “Nelonge post sia alveno al Pekino kun sia balalajko, † la rusa blinda poeto sinjoro Eroŝenko ekplendis al mi: ‘Ho solece, solece, tiel solece kiel en dezerto!’” Por sin savi de tia soleco, Eroŝenko unue aĉetis dek kelkajn ranidojn kaj ilin bredis en la lotus-lageto en la korto por ke li povu ĝui kvakadon en someraj noktoj post kiam ili plenkreskos. Sekve de tio, li aĉetis kvar amindajn anasidojn. Sed kiu atendis, ke la ranidoj estis ĉiuj formangitaj de la anasidoj antaŭ ol fariĝi “muzikistoj de la lageto” laŭ lia espero.

Je la fino de la novelo, Lusin skribis:

“Kiam la anasidoj formetis la flavajn lanugojn, sinjoro Eroŝenko subite eksopiris ekvidi sian ‘patrinon Rusio’, kaj haste forveturis al Ĉita. . . . Jam forpasis la somerfino kaj nun komenciĝas la vintro, sed an-

koraŭ nenia informo alvenis de sinjoro Eroŝenko kaj oni ne scias kie nun li efektive estas. Restas nur la kvar anasoj, kiuj ankoraŭ kvakadas en la ‘dezerto’.”

Kvankam la mallonga rakonto okupis malpli ol 4 paĝojn, tamen per ĝi Lusin bone prezentis al ni la intiman fizionomion kaj enkoran solecon de Eroŝenko, kaj ankaŭ elskribis sian profundan amon kaj sopiron al la blinda poeto.

Ni scias, ke Lusin ŝatis la verkojn de Eroŝenko, kaj li ankaŭ estas la plej frua kaj ĉefa tradukanto de liaj verkoj por la ĉina legantaro. Frue kiel en julio de la jaro 1921, Lusin jam unuafoje tradukis lian fabelon *Malvasta Kaĝo* kaj ĝin aperigis en la aŭgusta numero de *Nova Junulo*. Li skribis en la *Post Traduko*: “Post kiam Japanio ekzilis iun rusan blindulon je la 28-a de majo, 1921, multa inko veriĝis pri tio en la japana gazetaro, kaj nur post tio mi komencis atenti pri tiu ĉi migranta blinda poeto Vasilij Eroŝenko.” Ne longe poste, en la komenco de septembro, Lusin tradukis por la *Felietono de la Matena Ĵurnalo* alian fabelon de Eroŝenko, nome *Sur*


* *Ge Baoĉjuan* — estro de la studfako pri soveta kaj orienteŭropa literaturo de la Instituto de Literaturo de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj membro de la Konstanta Komitato de la Unuiĝo de Ĉinaj Verkistoj.

** La plena nomo de la blinda poeto estas Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko. Li naskiĝis je la 31-a de decembro, 1889, kaj blindiĝis pro variolo kiam li estis 4-jara. Dum la periodo 1898-1906 li lernis en la Unua Lernejo por Blinduloj de Moskvo kaj komencis lerni Esperanton. Dum 1909-1910 li studis en Londono. En 1914 li veturis al Japanio, studis kiel esplora studento en blindula lernejo de Tokio kaj komencis kontribui al japanaj literaturaj gazetoj. Dum 1916-1919 li laboris kiel instruisto en blindulaj lernejoj unu post alia en Siamo, Birmo kaj Hindio. Poste li estis forpelita de la brita aŭtoritato el Hindio kaj reiris al Japanio. En majo de 1921, li estis arestita kaj ekzilita de la japana aŭtoritato pro lia partopreno en la maj-unua agado en Tokio kaj la Dua Kongreso de la Socialisma Ligo de


Japanio. Dum 1921-1923 li instruis Esperanton en Ŝanhajo kaj Pekino. Dum 1923-1927 li laboris en la Komunisma Universitato de la Orientaj Laboruloj en Moskvo. Dum 1930-1932 li laboris en la Blindula Ligo de Tuta Rusio. Dum 1935-1944 li instruis en la blindula lernejo de Turkmenio en Mezaŭstio. En 1945 li revenis al Moskvo. Ĉar li ofte suferis de malsano, li reiris al sia hejmloko en 1949. La 23-an de decembro, 1952 li forpasis je sia 63-jara aĝo. Eroŝenko verkis ĉefe en Esperanto kaj la japana lingvo kaj liaj ĉefaj verkoj estas tri kolektoj de fabeloj: *Kanto antaŭ la Tagiĝo*, *La Lasta Ĝemo kaj Por la Homaro*. El liaj verkoj aperis en Ĉinio ĉinlingve *Kolekto de Fabeloj de Eroŝenko* (1922), *Persikkolora Nubo* (dramo, 1923), *Rakontoj de Velkinta Folio* (1923), *Ŝipo de Feliĉo* (kolekto de fabeloj, 1931), *Forpasintaj Fantomoj ktp.* (kolekto de paroladoj, 1924). En Esperanto aperis *La Ĝemo de Unu Soleca Animo* (1923).

† Rusa plukata kord-instrumento kun triangula sonkesto.

la Bordo de Lageto. Ĉar li havis deziron “nerezisteblan por prezenti lian (t.e. de Eroŝenko) koron al ĉinoj”, kiel li diris tiutempe, li komencis tradukadi verkojn de Eroŝenko. Lusin tiam ŝatis kaj ektradukadis la verkojn de Eroŝenko ja ne hazarde. Kiel ni scias, ekde la jaro 1907, kiam Lusin verkis la unuan artikolon pri eksterlanda literaturo, li emfazadis jam pri la arda amo al libero kaj kontraŭstara batalspirito de la grandaj poetoj Bajron, Puŝkin, Mickieviĉ, Petofi k.a., intencante vekti la ĉinan popolon per la kontraŭstara ‘kor-voĉo’ de fremdlandaj verkistoj kaj poetoj. Pli poste, parolante pri sia ekverkado de noveloj en sia artikolo *Kiel Mi Komencis Verki Novelojn*, li skribis denove: “Mi intencis nur plibonigi la socion per ilia (t.e. de la noveloj) forto. Mi tamen ne inkliniĝis al verkado, mi ĉefe interesiĝis pri prezentado, pri tradukado de verkoj, precipe mallongaj kaj tiuj de verkistoj de subpremataj nacioj.” Ĉar li “deziris verkojn laŭte kriantajn kaj kontraŭstarajn”, tial li prezentis kaj tradukis multajn verkojn de Rusio kaj orienteŭropaj landoj. Oni povas diri, ke li ekatentis pri Eroŝenko kaj komencis traduki liajn verkojn en 1921 ankaŭ el la sama rezono. Li mem klare diris pri tio en la *Post Traduko* por *Malvasta Kaĝo*:



“Kolekto de Fabeloj de Eroŝenko” eldonita en Ĉinio. Sur la libro skribita de Lusin en Esperanto: Al kara Sinjoro S. Fukuoka, de la tradukinto.



“Persikkolora Nubo” eldonita en Ĉinio.

“Eroŝenko ne estas poeto mondfama, kaj mi ne bone scias pri lia kariero. Mi scias nur, ke li estas pli ol 30-jara, antaŭe li estis en Hindio kaj estis forpelita el ĝi de la brita aŭtoritato pro lia inklino al anarkismo; sekve iris al Japanio, kie li eniris ĝian lernejon por blinduloj kaj mutuloj; kaj nun denove forpelita de la japana aŭtoritato pro tio, ke li estas suspektata pri propagando de danĝeraj pensoj.

“Japanio kaj Britio estas aliancaj landoj, do en frata interrilato. Se li estis forpelita de Britio, do nature li devis esti forpelita ankaŭ de Japanio. Sed en la lasta okazo, aldoniĝis insultoj kaj batoj. Same kiel ĉiuj batitoj, kiuj ofte postlasas objekton aŭ sangan, ankaŭ Eroŝenko postlasis ion, nome kolektojn de siaj verkoj, el kiuj unu estas *Kanto antaŭ Tagiĝo*, alia *La Lasta Ĝemo*.

“. . . Konsiderate entute, li ne havas intereson pri politiko kaj ekonomio, nek enkaŝas odoron de danĝera penso; li havas nur naivan, tamen belan kaj puran koron, kaj la limoj en la mondo ne povas limigi liajn revojn, tial li ofte eldiris indignajn vortojn pri Japanio kvazaŭ pro sia propra sufero. Lia rusa spirito de vasta stepo estis nekonvena en Japanio, kaj nature li estis regalita per batoj kaj insultoj. Tamen tion li ne atendis, kio do plene montras, ke li havas nur naivan tamen puran koron. Ferminte la libron, mi sentas profundan dankon, ke troviĝas en la homariaj homoj ne perdintaj la infanan koron, kiuj sin okupas per verkado.

“La *Malvasta Kaĝo*, . . . eble devenis de liaj pensoj kaj indignoj dum lia vivo en Hindio. Li mem diris: Tio ĉi estas verkita per sango kaj larmoj. . . .

“Ho, kiel amplekseĝaj estas la larmoj de la poeto! Mi amas tiun ĉi naivan poeton Eroŝenko, kiu atakis la ‘sati’-on* alilandan, ja multe pli ol la hindan poezian majstron Tagore, kiu laŭdis la ‘sati’-on de sia lando kaj gajnis la Nobel-premion; mi malbenas la belan sed venenan daturon.”

Post elpeliĝo el Japanio, Eroŝenko unue estis sendita al Vladivostok, tiam okupita de blanka rusa armeo. Tiutempe Eroŝenko tre deziris iri al Moskvo tra Ĉita, sed pro malfaciloj en trafikado sur la longa vojo, li unue venis al la urbo Harbin en nia lando, kaj en la komenco de oktobro de la sama jaro li venis al Ŝanhajo. Tiam, ĉina esperantisto Hujucz† verkis artikolon *Pri Blinda Poeto Eroŝenko*, kiu aperis en ŝanhaja ĵurnalo, kaj tuj sekve de tio, la *Felietono de la Matena Ĵurnalo* eldonis en oktobro “Specialan Numeron de Eroŝenko” por bonvenigi la blindan poeton. Kaj en tiu numero aperis lia fabelo “*Sonĝo en Printempa Nokto*” tradukita de Lusin.

* ‘Sati’ estas malnova moro en Hindio, laŭ kiu la vidvino devas esti forbruligita kune kun la korpo de sia mortinta edzo.

† Hujucz estas unu el iniciatintoj de la ĉina Esperantomovado. Li koniĝis kun Eroŝenko kaj tradukis liajn Rakontojn de Velkinta Folio kaj fabelojn. Nun li estas la prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Lusin ekriatiĝis kun Eroŝenko supozeble en novembro de tiu jaro. En sia tagnoto de la 4-a de novembro Lusin skribis: “Antaŭtagmeze mi ricevis leteron de Hujucz”, kaj en tiu de la 5-a li skribis denove: “Antaŭtagmeze mi sendis leteron al Hujucz”. Ambaŭ tiuj leteroj ne estas konservataj, sed el la *Post Traduko* skribita de Lusin je la 10-a de novembro por sia tradukajo de la fabelo *La Malĝojo de Fiŝoj* de Eroŝenko oni povas legi: “En sia antaŭparolo por *Kanto antaŭ la Tagiĝo* Eroŝenko diris, ke *La Malĝojo de Fiŝoj* kaj *La Koro de Aglo* estas verkitaj el malĝojo de artisto. Iam mi intencis traduki la unuan, sed la plumon mi formetis finfine, kaj tradukis nur la fabelon *La Koro de Aglo*. Antaŭ nelonge sinjoro Hujucz skribis al mi, ke la aŭtoro diris, ke *La Malĝojo de Fiŝoj* plej plaĉas al li, ke mi unue ĝin traduku; sekve mi ĝin tradukis kun peno.” Oni povas diveni el tio, ke la korespondajoj de Lusin kaj Hujucz tre verŝajne temis pri tradukado de fabeloj de Eroŝenko, ke la blinda poeto jam informiĝis ke Lusin estas tradukanta liajn verkojn kaj li eĉ rekomendis al li la fabelon *La Malĝojo de Fiŝoj*, ke li ĝin traduku unue.


En la komenco de 1922, Eroŝenko estis invitita de la Pekina Universitato por Instruado de Esperanto, kaj li ekloĝis ĉe Lusin post sia alveno al Pekino en februaro. Ili povis intime interparoli en la japana lingvo, kaj de tiam estiĝis inter ili profunda amikeco verkista. En la komenco de 1922, Lusin finis la tradukadon de *Kolekto de Fabeloj de Eroŝenko*; kaj en aprilo aŭ majo li tradukis, sub helpado de Eroŝenko mem, la fabel-dramon *Persikkolora Nubo* originale verkita en la japana lingvo. En la antaŭparolo skribita en julio Lusin diris: “La verkinto deziris, ke mi frue traduku la verkon *Persikkolora Nubo*, ĉar ankaŭ li mem opinias, ke ĝi estas pli bona ol la antaŭaj, kaj li volas kiel eble plej rapide ĝin donaci al la ĉinaj junuloj.”

En la komenco de julio, 1922, Eroŝenko veturis de Pekino tra Moskvo al Finnlando por partopreni la 14-an Universalan Kongreson de Esperanto en Helsinki, kaj li revenis al Pekino nur en novembro. Nelonge antaŭ tio, en oktobro, Lusin verkis la novelon *Komedio de Anasoj* por esprimi sian sopiron al Eroŝenko. Reveninte al Pekino, Eroŝenko loĝis ĉe Lusin kiel antaŭe ĝis aprilo de 1923, kiam li forlasis Pekinon kaj reiris al Sovetunio definitive. Laŭ la taglibro de Lusin, la periodo, dum kiu Eroŝenko loĝadis en Pekino, ankaŭ estis tempo de lia plej vigla agado. Unuflanke li instruadis kun entuziasmo, aliflanke li aktive partoprenadis diversajn sociajn aktivadojn. Li faris paroladojn en pekinaj altgradaj lernejoj kiel ekzemple la Pekina Universitato, la Altgrada Instruista Lernejo, la Instruista Universitato por Virinoj k. a. Multaj el liaj paroladoj estis pri sociaj problemoj, kaj liaj prelegoj faritaj en la Pekina Universitato pri la rusa literaturo prezentis al ni la brilajn atingojn de la rusa literaturo, kaj propagandis pri la bona tradicio de revolucia demokratio de la rusa literaturo. Kvankam Eroŝenko

estis blindulo kaj ne scipovis la ĉinan lingvon li tamen same entuziasme partoprenis la aktivadojn de la junaj gestudentoj. En aprilo de 1922, li kantis la faman rusan popolkanton *Stenka Razin* en vesperkunveno aranĝita en la Popola Vesperlernejo de la Pekina Universitato; la unuan de majo tiujare, li kantis *La Internacion* ĉe la Celebra Kunveno de la Unua de Majo en Komte-lernejo; kaj en la novjara tago de 1923, li partoprenis la kunlanternan manifestacion de pekinaj gestudentoj. Eroŝenko venis al Ĉinio ĝuste post la Maj-kvara Movado. Li esprimis sian senliman simpatian al la suferanta ĉina popolo per sia poezio en prozo *Rakontoj de Velkinta Folio* verkita en Ŝanhajo; li vekadis la homojn per siaj fabeloj verkitaj kun naiva koro de poeto, ke ili pensu pri feliĉa estonteco; kaj per siaj verkoj kun klardistinga amo kaj malamo li instigadis la homojn al batalo por libero. En Ŝanhajo kaj Pekino li propagandis pri Esperanto, faris paroladojn kaj interrilatiĝis kun junaj gestudentoj, kio certgrade konsciigis kaj kuraĝigis la progresemajn gejunulojn kaj intelektulojn. Kvankam Eroŝenko restis en nia lando entute nur iom pli ol unu jaron, tamen li postlasis tre profundan impreson kaj influon ĉe ni. Kaj ĝuste dum tiu periodo de iom pli ol unu jaro, profunda amikeco naskiĝis inter Lusin kaj Eroŝenko. Tiu amikeco prezentiĝis ne nur en ilia komuna vivo, sed ankaŭ en ilia komuna verkado.

La 25-an de septembro de la kuranta jaro estis la 80-a datreveno de la naskiĝo de Lusin, kaj la 19-an de oktobro estos la 25-a datreveno de lia forpaso. Kaj krome, la lasta aŭgusto estis la 40-jara datreveno de la unuafoja publikiĝo de verko de Eroŝenko en Ĉinio kaj la 40-jara datreveno de lia veno al Ĉinio. Kvankam estas tre hazarde, ke ĉiuj ĉi tiuj signifoplenaj datoj tre proksimas unu de alia, tamen la profunda amikeco inter Lusin kaj Eroŝenko restos por eterne brila paĝo en la historio de la “verkista amikeco” inter Ĉinio kaj Rusio.

La 10-an de okt. 1961, Pekino.



La plej nova el la pluraj eldonoj de la “Verkaro de Lusin” post la Liberiĝo.



HIMNO DE NOKTO

Tradukita de Liu Ling

Tiu ĉi eseo estis verkita de S-ro Lusin la 8-an de junio, 1933, kaj publikigita en la rubriko Libera Parolejo de la ĵurnalo Ŝenbaŭ de Ŝanhajo la 10-an de la sama monato. Ĝi faris al la tiama socio akrajn malkovron kaj sarkasmon.

— La Red.

TIUJ, kiuj amas la nokton, estas ne nur soluloj, senokupuloj, tiuj kiuj ne povas batali kaj tiuj kiuj timas la lumon.

La parolo kaj ago de homo ofte manifestiĝas malsamaj en luma tago kaj profunda nokto, sub la suno kaj antaŭ lampo. La nokto estas mistera ĉiela surtuto, teksita de la naturo, kiu kovras senescepte ĉiujn homojn, ilin varmigante kaj trankviligante, tiel ke ili senkonscie demetas mem iom post iom la artfaritajn masojn kaj vestojn, kaj estas nude envolvitaj en tiu senlima nigra vatsimila masego.

Kvankam estas nokto, ekzistas tamen luma kaj malluma. Ekzistas nokto lumeta, nokto obskura, nokto, en kiu oni ne povas vidi eĉ sian propran manon antaŭen etenditan, nokto kiu estas pec-nigra ĥaoso. Nokto-amantoj devas havi orelojn nokto-aŭskultajn kaj okulojn noktorigardajn por rigardi ĉian mallumon, sin trovante en la mallumo. Ĝentilhomoj, irinte de sub

elektraj lampoj en mallumajn ĉambrojn, etendas sian lacigitan talion kaj oscedas. Geamantoj paŝas de sub lunlumo en arbo-ombron, kaj subite ŝanĝas siajn rigardojn. La alveno de la nokto forviŝas ĉiujn superpartiajn, nebulozajn, subite komprenantajn, indignantajn kaj ridetantajn verkojn, kiujn la literaturuloj kaj instruituloj skribis sur okulpike blanka papero en sunplena tago, ke postrestas nur la nokta spiro de kompatpeto, flato, mensogo, trompo, fanfarono kaj intrigo, formantaj brilajn orajn aŭreolojn super la eksterordinaraj kleraj kapoj, kiajn oni vidas en budhismaj pentraĵoj.

Tiel la amantoj de nokto ricevas la lumon de ĝi donitan.

Moderna fraŭlino kun altkalkanumaj ŝuoj vigle iras klakklake sub la elektraj lampoj ĉe strato, sed sur la pinto de ŝia nazo ankaŭ briletas iom da oleŝvito, pruvante ke ŝi ĵus eklernis la modon, se longe troviĝante en brilega lumigado, ŝi trafos sorton de "malprospero". La malhelo de

longa vico da fermitaj firmoj iom helpas ŝin, ke ŝi povas malstreĉiĝi de plenvaporo kaj ekspiras libere, nur tiam ŝi eksentas la blovadon de malvarmeta nokta vento, kiu osmozas ĝis la koro.

Tiel noktamantoj kaj modernaj fraŭlinoj samtempe ricevas la favoron donitan de nokto.

Kiam forpasis la nokto, oni denove singardeme leviĝas kaj eliras; eĉ ĉe la geedzoj kiel diferencas la mienoj nun ol antaŭ kvin aŭ ses horoj. Jen komenciĝas viglado kaj bruado. Tamen malantaŭ la altaj muroj, en grandaj domoj, profundaj buduaroj, mallumaj karceroj, gast-salonoj kaj sekretaj institucioj, ankoraŭ regas terura vera mallumego.

La nuna hela taglumo kaj la svarma alveno kaj foriro de pasantoj, estas ornamo de tiu mallumo, ora kovrilo sur peklujo de spicita homa karno, kaj pudro sur vizaĝo de fantomo. Nur la nokto estas ankoraŭ honesta. Mi amas nokton, tial verkas en nokto la *Himno de Nokto*.

8 junio [1933]

(Daŭrigo de p. 263)

Partia Komitato de la Farmejo tuj en la sama nokto organizis savlaborojn. Tiam Huang Mejĝen estis jam dormanta. Oni vekis lin por alporti la maljunulojn kaj infanojn de tie al la ĝenerala administrado. Li tuj ekiris en subvesto, ne zorgante por sin vesti. Estis jam noktomezo kaj en pluvego. Li tremis pro malvarmo. Kaj plie la ŝoseo estis tie inundita. Traveturi estis tre danĝere! Sed, se li ne irus, kio fariĝos al la maljunuloj kaj infanoj? Kiam li pensis, per kio li partoprenu en la socialisma konstruado de la patrio, se li ne povus venki tiun negrandan malfacilon, li kuraĝe kaj atente direktis la aŭton tra la loko kie estis malpli profunde subakvigita. En tiu nokto li veturigis la aŭton ir-reire

tri foje. Kiam li finis la transportadon de la maljunuloj kaj infanoj, estis jam tagiĝo.

Estas tiaj revenintaj ĉinaj elmigrintoj kiuj puŝis la produktadon de la Farmejo antaŭensalti, kaj transformas la sovaĝejon kaj virgajn montojn iom post iom en belan lokon kie fruktoj plenigas ĝardenojn, rizaromo plenigas la kampojn kaj brutoj kaj kortobirdoj plenigas bredejojn.

En la kelkaj tagoj dum kiuj mi restis tie, mi vidis dufoje filmojn projekciatajn de la kinotrupo de la Farmejo. En la antaŭa vespero de mia foriro, la lernantoj de la agrikultura mezlernejo faris fervore sian antaŭripeton de programeroj, per kiuj ili partoprenos la "vesperon por celebri la abundan rikolton", okazonta post la somera rikolto.

Funebro pri K-do Mej Lanfang

— Majstro de la Pekina Opero

Mej Lanfang (1894-1961) estas la plej eminenta aktora majstro de la pekina opero en nuntempa Ĉinio. Li havas noblan patriotisman spiriton kaj neŝanceblan lojalecon por la nacio. Li faris grandan kontribuon en servado per la arto al la laboristo, kamparano kaj soldato, al la konstruo de ĉina teatro, al la kultura interfluo inter Ĉinio kaj aliaj landoj, ankaŭ al la defendado de la mondpaco. En la 8a de aŭgusto ĉijare, li mortis en Pekino pro malsano. Lia morto estas grandega perdo de la ĉinaj artaj rondoj. Jen ni petis la faman dramverkiston, K-do Tian Han, la prezidanto de la Unuiĝo de Ĉinaj Teatraj Laborantoj, por prezenti mallonge al niaj legantoj la vivon kaj atingojn de la bedaŭrata majstro de la pekina opero.

— La Red.

K-DO Mej Lanfang nin forlasis. Sed ŝajnas al mi ke li ankoraŭ staras antaŭ miaj okuloj. Mi ne kredas ke li jam mortis.

Efektive, kiu ja povus kredi, ke jam mortis majstro Mej, kiu eĉ en malsanlito ankoraŭ ne povis sin deteni de sia heroeca aspiro kaj sopirego al la arta

Lusin:

Batalanto kaj Muŝoj

Tradukita de Ilin

Tiu eseo estis skribita de Lusin la 21-an de marto 1925, kaj aperis siatempe en la semajna aldono Popolamasa Literaturo Nr. 14, de la ĵurnalo Ging Baŭ, Pekino. Samjare en aprilo la aŭtoro parolis pri ĝi en alia artikolo, dirante: "Per 'batalanto' mi aludas S-ron Sun Jatsen kaj la martirojn mortintajn pro la patrio antaŭ kaj post la revolucio de 1911, kiujn mokis kaj kotĵetis la sklavemuloj; dume per 'muŝoj', kompreneble, mi aludas la lastajn."

— La Red.



SCHOPENHAUER* iam diris ke por taksu la grandecon de homo, la leĝo koncernanta la spiritan staturon kaj tiu koncernanta la korpan formaton estas tute inversaj unu al la alia. Ĉar ju pli malproksime la homo estas for de ni, des pli malgranda aspektas lia korpo, dume des pli granda lia spirito.

Ĝuste pro tio ke la homo aperas spirite pli malgranda en proksimeco kaj liaj difektoj kaj vundoj estas pli klare videblaj, tial li, same kiel ni, estas ne dio,

nek monstro, nek stranga besto. Li restas ankoraŭ nur homo, ne pli. Sed ankaŭ ĝuste tial li estas granda homo.

Kiam batalanto falis en la batalo, kion la muŝoj rimarkas unue, estas liaj difektoj kaj vundoj. Ili suĉas kaj zumas kun granda kontento, pensante ke ili estas pli heroaj ol la falinta batalanto. Sed ĉar la batalanto jam mortis kaj ne povas forpeli ilin, do ili zumadas eĉ pli laŭte kaj imagas ke ĝuste ilia zumado

estas io senmorta, ĉar ili estas multe pli perfektaj ol la batalanto.

Efektive, neniu ja rimarkis difektojn kaj vundojn de muŝoj.

Sed la mankhava batalanto tamen estas batalanto finfine, dume la perfektaj muŝoj restas finfine nur muŝoj.

For, muŝoj! Kvankam vi havas flugilojn kaj povas ankoraŭ zumadi, tamen vi povos neniam superi la batalanton, vi insektoj.

* Arthur Schopenhauer (1788—1860): Germana pesimisma filozofo.



Kamarado Mej Lanfang.



Mej Lanfang gajnis entuziasman bonvenigon de la japana popolo, dum li vizitis Japanion estrante la Ĉinan Pekin-operan Trupon en 1956.

kreado kaj konstruado de dramaturgio! Ĉu li ne razis lipharojn ĉiutage eĉ en sia malsanlito, rigardante sin en spegulo timante ke li ne plu povus prezenti operon pro malgraseco? Ĉu li ne ripete preparolis, ke li volas veturi al Hingiang kaj prezenti operojn por soldatoj kaj popolanoj ĉe la nordokcidenta landlimo, kiam ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, vizitis lin kaj lin admonis ke li ripozu trankvile?

Tamen, la fakto kruele diras al mi ke majstro Mej ja vere mortis. Mi malĝojas, ke ni perdis unu respektindan kunbatalanton, kaj bedaŭras ke la ĉiam energia senlaca teatra laboranto estas deŝirita de la konstruado de socialisma teatro.

Heredanto de Estinteco kaj Kondukanto al Estonteco de la Pekina Opero

Mej Lanfang devenis de operaktora familio, kies kvar generacioj, li kaj liaj avo, patro kaj gefiloj estas geaktoroj. En la pasinta socio, la aktoroj estis samtempe ŝatataj kaj malestimataj, kaj ĝenerale tre mizera estis ilia vivo. Krome, Mej Lanfang perdis sian patron en infaneco, kaj povis daŭrigi sian vivon nur dank' al la nutrado de sia onklo, kiu laboris kiel huĉin-ludisto* por famaj aktoroj Tan Hinpej kaj Vang Jaŭking en tiu tempo. En sia okjara aĝo li eklernis aktoran arton, kaj en la dekunu-jara aĝo li komencis jam ludi rolon sur scenejo. Severa kaj profunda estis lia lernado, kaj krome li havis ankaŭ ŝancon akiri instruojn de la famaj veteranaj


* Huĉino — ĝenerala nomo por ĉina muzikilo dukorda ludata per arĉo.

aktoroj. Tio donis al li tre bonan fundamenton de eminenta aktora arto en la venonteco.

En la fino de King-dinastio (1644-1911 p.K.) la rolado de la pekin-operaj aktoroj estis severe dividitaj. Tio kion majstro Mej lernis estis la rolo de ĝentila virino en la historiaj rakontoj. Rolado de tia rolo akcentas ĉefe kantadon sed ne la dancadon, gestadon kaj sentesprimojn. En 1910, post la renversiĝo de la regado de King-dinastio, sekve de la alta postulo de la popolamaso al la pekina opero, li komencis lerni operojn en kiuj la dancado, gestado, sentesprimoj kaj batalarto estas akcentataj.

En 1907, sub la influo de la novteatra movado, celanta reformadon de la socio, li eksentis la respondecon de aktoro al la socio, kaj li prezentis serion da novaj pekinaj operoj en moderna kostumo kun temoj kontraŭ la subpremado al la virino, deviga geedzigo kaj superstiĉoj. Oni povas diri ke majstro Mej estis unu el la pioniroj kiuj aplikis la pekinan operon, la malnovan ĉinan operospecon por prezenti modernan temon.

Samtempe kiam majstro Mej akceptis la influon de la moderna dramo, li ege interesiĝis ankaŭ pri *kunĉju*, unu el la specoj de malnovaj tradiciaj operoj havanta historion de 4-5 cent jaroj. Li lernis ne malmultajn operojn de *kunĉju*, kaj surbaze de tio li kreis glavodancon, manikodancon, verdpluman dancon, falĉiletan dancon, silkrubandan dancon ktp., kaj pliriĉigis la kolorojn de multaj pekinaj operoj. Li ankaŭ faris multajn kreivajn reformojn pri la kostumo, hararangĝo ktp. de la virina rolo laŭ antikvaj pentraĵoj, gravuraĵoj, skulptaĵoj, ktp. Li ankaŭ enkondukis novajn muzikinstrumentojn al la akompana muziko de



Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito Mei Lanfang interrompis sian karieron kaj kreskigis lipharojn por ne fari prezentadon por japanoj kaj naciperfiduloj.



Mei Lanfang kaj Stanislavskij, sovetia dramisto (1935).

la pekina opero por ke ĝi sonu en harmonio kaj forte kaj milde, pli favore al la evoluo de la kantmaniero de la virina rolo. En kelkaj teatraĵoj, ekz-e en *La Diino de Luo-rivero*, li laŭbezzone uzis scenan dekoracion rompante la tradician jugon de la pekina opero. Oni diris tute sen troigo ke majstro Mei estas la plej fidela heredanto de la tradicio de ĉina opero, sed samtempe li ankaŭ estas la plej kuraĝa reformisto. Kvankam li renkontis la kontraŭstaron de multaj konservativuloj en la reformado de la arto de la pekina opero, tamen sukcesis grandparte liaj prudentaj kaj paciencaj provadoj kaj finfine ankaŭ la kontraŭuloj ne povis ne lin admiri elkore.

Eminenta Sukceso en Arto

La arto de majstro Mei jam atingis la ardan gradon de majstreco, ĝuste kiel K-do Kuo Moĵo diris: “li estas la enkorpiĝo de la belo de teatra arto. Lia bela kantvoĉo, majesta teniĝo, eleganta moviĝo, ĉiu moveto de la manoj, piedoj, brovoj kaj ĉiu vorto de lia kantado kontribuas al kreo de la tipo de belo.” Tial li akiris ne nur amon kaj estimon de la ĉina popolo, sed ankaŭ ĉiuj fremdaj amikoj kaj artistoj kiuj renkontiĝis kun li, tre alte taksis lian aktoran arton. Iam li vizitis Japanion, Usonon kaj Sovetunion kaj ĉie li akiris sukceson. En 1956 li estris la Ĉinan Pekin-operan Trupon en vizito al Japanio kaj faris tie prezentadon. Tiun ĉi fojon la reformitaj pekinaj operoj estis prezentitaj. La altgrada kolektivismo kaj la unueca, perfekta, viveca kaj harmonia arta figuro, kiujn oni montris en la prezentado, akiris unuaniman laŭdon de la japanaj spektantoj. En siaj famaj operoj kiel *La Ebriiĝo de la Imperiestra*


Kromedzino li elskulptis belajn figurojn historiajn sed profunde emociantajn homojn en nuntempo. Tio donis al la japanaj spektantoj grandan ĝuon de la arto.

En 1935, la famkonata filmdirektoro de Sovetunio Eĵenŝtejn vidis la prezentadon de la opero *Fisista Venĝo* fare de majstro Mei. Kiam li vidis ke majstro Mei kaj aliaj aktoroj saltis de la imagita bordo sur la imagitan boaton kaj tiel bone priskribis per la moviĝo de la korpo la balanciĝon de la boato sur akvo, li diris admire: “Jen mi ekvidis veran teatrarton.” La elstara teoriisto de teatra arto de Sovetunio Stanislavskij, vidinte la prezentadon de majstro Mei, diris: “La prezentado de ĉina opero estas speco de libera agado reguligita.” Poste li donis instrukcion al siaj studentoj, ke ili devas lerni atente de la ĉina opero, ĉar li opiniis ke ĝi estas teatraĵo de formaligita realismo kaj abunda je poezia sentimento.

Tio, kio ebligis al majstro Mei akiri tian sukceson en la aktora arto de la pekina opero, kiel li mem diris, “ne ŝuldas al ia sekreta metodo, sed al ‘akumulado de laborado’.” Tamen, li ne nur povis ellerni la regulojn de prezentado de la pekina opero per diligenta laborado, sed ankaŭ povis kunligi la regulojn kun la vivo, ke li povis apliki la regulojn sed ne esti katenita de ili, kaj tial li povis plue evoluigi kaj riĉigi la malnovajn regulojn levante la aktoran arton de la pekina opero al nova alteco.

Varma Amo al la Patrio kaj Neŝanceblebla Justamo

Tamen, majstro Mei ja ne estis artisto en la eburato. Ekde 1914 kiam li prezentis kontraŭ-feŭdismajn



Mej Lanfang en sia junaĝo.



Mej Lanfang studas operan arton kun famaj geaktoroj de diversspecaj operoj Ju Ĝenfej, Ma Ŝizeng, Hong Hiannju, Ĉang Hiangju, Ĉen Bohua ktp.

operojn en moderna kostumo ĝis 1931 kiam la japanaj imperiistoj invadis Ĉinion, kiam li prezentis operojn propagandantajn por rezistmilito kontraŭ invado, kaj ĝis antaŭ nelonge reveninte de la fronto de Fugian-provinco, li preparis kaj prezentis la operon *Muguj-jing kiel Komandantino* kiu montras la firman rezistadon kontraŭ la malamiko de la heroino, lian tutan artistan vivon trakuris la ruĝa fadeno de patriotismo. Li distingis severe kaj klare la limon inter la malamiko kaj amiko, tute sensanceliĝe.

Mi memoras ke en la jaro 1935 kiam grandskale japanaj invadistoj atakis Ĉinion kaj la Kuomintanga reaktularo sieĝis la Centran Sovetan Regionon, li ricevis inviton por oper-prezentado preskaŭ samtempe el Sovetunio kaj Japanio. La japanoj promesis doni al li altan rekompencan, sed majstro Mej decideme rifuzis la inviton el imperiisma Japanio kaj veturis al Sovetunio. Kaj ne volante trapasi la tri provincojn en la Nordoriento, tretatajn de la japanaj invadistoj, li gvidis sian trupon de la pekina opero veturi per ŝipo rekte de Ŝanhajo al Vladivostoko.

Dum la okjara okupado de la japanaj invadistoj, li kreskigis siajn lipharojn, ne ludis plu, ne faris viziton, nek akceptis gaston kaj absolute ne kantis nek dancis por la malamikoj kaj naciperfiduloj. Poste, nepovante elteni la ĝenadon de la malamikoj li unufoje rifuĝis al Hongkongo, kie li sin vivtenis el mono prenita lombarde.

Post la kapitulaco de la japanaj invadistoj, majstro Mej kvankam rekomencis sian teatran vivon, tamen konante la krimon de Ĉiang Kajŝek-klika, kiu

perfidis la patrolandon kaj sin submetis al la usona imperiismo, li aktive partoprenis la progreseman demokratian movadon responde al la alvoko de la Ĉina Komunista Partio, en tiu tempo.

Post la Liberiĝo de la tuta lando en 1949, majstro Mej veturis de Ŝanhajo al Pekino kaj ĉeestis la unuan kongreson de reprezentantoj de verkistoj kaj artistoj, la Politikan Interkonsiliĝan Konferencon de la Ĉina Popolo, la Kongreson de Popolaj Reprezentantoj, kaj partoprenis la kulturalan konstruadon, internacian pacmovadon kaj internacian kulturalan interfluon, ktp. Per siaj propraj okuloj majstro Mej vidis sian patrolandon vere liberiĝinta de la kateno de imperiistoj kaj koloniistoj, kaj tagon post tago vigle progresas la konstruado de socialismo, kaj pro tio lia arta entuziasmo pli altiĝis. Post la Liberiĝo li faris multfoje prezentadojn por laborantaj popolamasoj tra la tuta lando, de la fronto de Koreio ĝis diversaj lokoj ĉe la landlimoj. Kvankam lia aĝo jam superis 60 jarojn, tamen li sentis sin ricevinta novan vivenergion en arta kreado, kaj eĉ plifortiĝanta fizike. Li diris, ke progresas ankoraŭ lia voĉo kaj la voĉoregistro, eĉ pli altiĝis je unu tono ol antaŭ la Liberiĝo.

Ege bedaŭrinde estas, ke li mortis, ke li mortis ĝuste tiam, kiam li projektis per scienca metodo kunordigi la teatrajn heredaĵojn de la patrolando en perfektan sistemon. Tio estas vere granda perdo malfacile kompansebla. Lian postlasitan taskon ni devas plenumi kaj lerni de li la spiriton severe sin eduki. Li iam diris: "Se oni jam nomas nin 'la inĝeniero de la homa animo', do antaŭ ĉio ni devas kulturigi nian propran animon pli bela kaj pli pura." Kaj li tion ankaŭ praktikis.

La Majoro en Trajno

EN la kupeo No. 24 de la remburita litvagono sin trovis kvar litoj. Komence nur tri estis okupitaj.

Mi, survoje al Ŝanhajo por viziti amikojn, okupis la malsupran liton ĉe la maldekstra flanko. En la supra lito kontraŭ mi kuŝis juna patrino kun infaneto malpli ol trijaraĝa. Kvindekkelkjara inĝeniero kun grizaj haroj okupis la supran liton super mi. Sed la malsupra lito kontraŭ la mia restis longe vakanta. Kiam la trajno preterpasis Kjugiang, subite malfermiĝis la pordo kaj iun enkondukis la vagonisto, dirante:

“Tiu ĉi lito estas vakanta, ĉar la mendinto nuligis la mendon. Vi povas dormi ĉi tie.”

Mi malfermis la okulojn kaj vidis ke sub la okulpika lamplumo staras mezkreska armeano kun orkoloraj epoletoj de majoro eksterordinare brilantaj. Ĝentile li salutis min per kapbalanco. Mi ankaŭ rapide eklevis min responde.

Tiutempe la maljuna inĝeniero kiu dormis super mi ankaŭ susure turnis sian korpon — mi ne sciis ĉu pro la troa varmeco en la kupeo li tute ne endormiĝis, aŭ la veno de la nova pasaĝero lin vekis. Li subklinis sin kaj etendis sian brakon, por preni la teglason de la tableto.

“Nu, mi prenu por vi. . . .”

La nova veninta pasaĝero rapide transdonis la teglason al la maljuna inĝeniero, kiu rigardante lin ridis kaj demandis:

“Ĉu al Ŝanhajo”

La majoro kapjesis. Ĝuste kiam li volis aranĝi sian liton, li rimarkis ke la infaneto dormanta sur la supra lito eklevas la kapon, surrampas sur la korpon de sia patrino kaj krias:

“Panjo! Urin urin. . . . !”

Kriante la infaneto ankoraŭ viŝis al si la okulojn. Kiam la patrino sin turnis, ĉirkaŭbrakis la infaneton kaj estis malsupreniĝonta, la majoro rapide transprenis la infaneton kaj diris al ĝi ameme:

“Ne timu! Liberigarmeaa oĉjo helpos al vi. . . .”

Rigardante la ridetantan vizaĝon de la liberiga armeano, la infaneto silente malsupreniris.

“Eta Pu, urinu en la kraĉujon! . . .” kriis la juna patrino de supre.

“Ne! Eksteren. . . .” La in-

faneto volis urini ekstere en la necesejo.

“Vi estas ja tiel regulema! Nu, mi portos vin tien. . . .” La majoro ridis kaj foriris, tenante la infanon en siaj brakoj.

Reveninte de la necesejo, la majoro redonis la infaneton al la patrino. Post tio li komencis ordigi la litajojn. Li malfermis la valizon kaj elprenis du pakajetojn, kiujn li zorgeme metis apud la kapkuseno. Li longe ilin rigardis, ilin kaj palpis per la mano. Kiam li, turninte la kapon, rimarkis ke mi estas lin rigardanta, li klarigis al mi ridetante:

“Kunportante tiujn objektojn sur la vojo, oni ja ĉiam timas pri rompiĝo. . . .”

“Kiaj objektoj?” Mi demandis scivoleme.

Anstataŭ respondi precize, li nur diris:

“Io por mia patrino.”

La juna patrino supre estis frapetanta la infaneton al dormo, ian lulkanton zumante. Ĵetinte ekrigardon supren, la majoro okulsignis al mi ke mi ĉesu paroli kaj nia interparolo tiel interrompiĝis.

Frumatene la sekvintan tagon, kiam ni ankoraŭ ne leviĝis, jam estis malplena la lito de la majoro. Kiam mi eliris kun viŝtuko kaj dentobroso, mi aŭdis la majoron babilanta kun la vagonisto en la koridoro de la vagono. Kaj kiam mi revenis de la manĝovagono post la matenmanĝo, la majoro jam revenis kun kuko, kiun li donis al Eta Pu kaj samtempe diris al ĝia patrino:

“Mi ne vidis mian patrinon jam por plena jardeko. Feliĉe mi trovas ĉifoje libertempon, tial mi nepre devas hejmeniri por viziti ŝin. . . .”

“Kie estas via hejmo?”

“Mia hejmo estas en Ginan, sed preterpasante Ŝanhajon, mi ankoraŭ vizitos alian personon. . . .”

Manĝante la kukon, Eta Pu tiris la patrinon el la kupeo. La maljuna inĝeniero kuŝanta sur la supra lito estis neparolema. Kaj mi, ĵus ricevinte ekzempleron de la Kantona Tagjurnalo, komencis legi ĝin kuŝante.

Trovante neniun babilpartion, la majoro povis nur kuŝi sur la lito kaj mallaŭte fajfkantis. Post momento li sidigis, flanken tiris la fenestrokurtenon kaj rigardis la pejzaĝon ekster la fenestro. Ŝajnis ke ĉio ĉi tio ne povis kvietigi lian ekscitiĝon. Li sin turnis por re-palpi siajn du pakajetojn, kiujn li jen metis sub la kapkusenon, jen denove elprenis kaj envalizigis, kaj fine li metis la valizon sub la kapkusenon. Post kiam mi finlegis la jurnalon, li leviĝis de la lito.



“Legu ĵurnalon, kamarado!

“Mi jam legis ĝin antaŭ ol mi envagoniĝis,” respondis la majoro. Tamen li prenis la legitan ĵurnalon kaj ĝin relegis sencele. Subite lia rigardo trafis iun anoncon.

“O! ‘Armeano Serĉata’! Kia stranga anonco! . . .” Ridante li ĵetis rigardon al mi, kaj mi tuj proksimiĝis al li. Ni kune legis:

“Ju Zikiang mia filo! Dek-kvar jaroj jam forpasis de post kiam vi partoprenis la revolucion. Dum la lastaj kvin jaroj venis neniu novaĵo de vi. Nun mi estas grave malsana. Tuj revenu hejmen por havi ŝancon intervidi. Via patrino Vang-Liu.”

La majoro daŭrigis la legadon:

“Laŭ la peto de militista familiano Vang-Liu, la Vilaĝa Registaro de Fuvang, Liujang-gubernio, serĉas k-don Ju Zikiang. Ju aliĝis al la armeo en 1942. En la armeo li okupis oficojn de subplotonestro kaj plotonestro. Li vundiĝis en la batalo por liberigi Tiangin en 1949 kaj el la hospitalo li sendis leteron al la hejmo. Depost tiam nenio pli aŭdiĝis de li. Lia sesdekkvarjara patrino tiel sopiris la filon ke ŝi malsaniĝis pro longdaŭra maltrankvileco. Dum la pasintaj kelkaj jaroj kuracado donis al ŝi malmulte da helpo. La malsano tre serioziĝis lastatempe. Krom informiĝi ĉe koncernaj instancoj, ni publikigas tiun ĉi anoncon, ĉiu kiu scias pri lia kieŝto, estas petata tuj nin sciigi. . . .” La majoro ekpaŭzis. Subite li redonis la ĵurnalon al mi kaj rapide malfermis sian valizon, el kiu li elprenis malgrandan notlibron kaj kriis dum la turnado de la folioj:


“Ĉu tiu ĉi Ju Zikiang estas la sama de nia trupo? . . .” Dirante tion, li tiel rapide foliumis, ke la papero susuris laŭte.

Subite li puŝis la notlibron antaŭ min, kaj ĝin fingromontris:

“Strange! Kiam Ju oferis sian vivon, ni jam sciigis tion al lia familio.”

Sekvante lian fingromontron, mi vidis sur la paĝo jenan noton:

“Vic-plotonestro Ju Zikiang de la Tria Plotono, Sesa Roto, de nia bataliono estas postmorte aprobita Duagrada Meritulo pro la jenaj kondiĉoj: 1. zorgemo pri la amaso, 2. kuraĝo en batalo. En urbataka batalo li ŝirmis la rivertransiron. Por elsavi kamaradon kaj armilon sub la malamika kanonado, li mem estis grave vundita kaj malfeliĉe oferis sian vivon.” Post tiu ĉi konciza priskribo troviĝis inter krampoj la jenaj vor-



Subite li puŝis la notlibron antaŭ min, kaj ĝin fingromontris: “. . . .”

toj: “K-do Ju estas Fuvang-ano, Liujang-gubernio, fraŭlo, kaj havas nur maljunan patrinon en la hejmo.”

Mi ekĝemis kaj diris: “Kion fari?”

Tiam la vizaĝo de la majoro flaviĝis. Li kunpremis la lipojn kaj liaj okuloj fariĝis malviglaj.

La maljuna inĝeniero, kiu ĝis nun sidis silenta sur la supra lito, senbrue etendis sian manon kaj transprenis la ĵurnalon. Post legado por momento li diris vorton post vorto:

“Kamarado, jen estas via devo, tuj sciigi ĉion al la vilaĝa registaro kaj lia familio. . . .”

La majoro restis senparola, rigardante min. Mi diris:

“La maljuna patrino serioze malsana. La novaĵo estus fulmotondro por ŝi!”

La inĝeniero diris supre:

“Kion fari? Ja estis en tempo de Liberiga Milito. Ĉu ni povus havi la nunan tempon se ne estus tiom da martiroj oferintaj sian vivon?”

La mieno de la majoro pli malheliĝis. Li ekfrotis alumeton kaj komencis fumi cigaredon. Post longe li subite diris:

“Tre kuraĝa estis k-do Ju, kiam li oferis sian vivon!” Ekblovinte fumon, la majoro profundiĝis en rememorado kaj daŭrigis: “Mi rememoras ke estis ordonite tiun tagon ke ni devas transiri la riveron en noktmezo por sturmi la surpontan pozicion de la malamikoj. Plotonestro Ju kun unu mitralo de la Sesa Subplotono ŝirmis la transiradon ĉe riverbordo. La lumgloboj de la malamikoj lumigis ĉion kvazaŭ en la tago kaj estis malkovrita la pozicio de nia mitralo. Tien aflugis unu obuso de la malamikoj, kiu falis ĝuste tri futojn for de ilia pozicio. La mitralisto

ankoraŭ ne rimarkis tion. Plotonestro Ju estis en tia urĝeco ke li senprokraste alkuris kaj, ĉirkaŭprenante kaj la homon kaj la maŝinpafilon, ruliĝis kune en la riveron. Tiel elsaviĝis la mitralo kaj la mitralisto. Sed fragmento de la obuso trafis lian vizaĝon. La brankarda teamo lin portis malantaŭen. Kiam mi renkontis lin sur la digo, li vokis min kaj elpoŝigis pakajeton kiun li donis al mi, dirante: "Batalionestro. . . . Jen estas mia subvencio duonmonata. Bonvolu transdoni ĝin al Ĝaŭ Ĝihian de la Kvina Subplotono. Mi timas ke eble mi ne povus renkonti lin post alveno al hospitalo. . . ." Mi transprenis la pakajeton kaj antaŭ ol mi havis tempon demandi pli detale, la ambulancisto jam urĝis la brankardon rapide foriri.

"Poste mi informiĝis ke en la Kvina Subplotono estas armeano nomata Ĝaŭ Ĝihian, kiu ĉiumonate ŝparis sian tutan subvencion, ne fumante eĉ cigaredon, kaj sendis la monon al sia patrino. Kiam la kamaradoj de la subplotono eksciis tion, ili okazigis kritikan kunvenon, en kiu la subplotonoestro kritikis Ĝaŭ kiel homon havantan tro fortan senton al sia familio kaj asertis ke tio estas feŭdisma penso, kaj al li ne decas tiel agi poste. Post la kunveno la subplotonoestro raportis tion al la plotonestro. Ĉe aŭdo de ĉio ĉi, Ju Zikiang estis tre kolera kaj severe riproĉis la subplotonestron. Kaj en la sama vespero Ju venigis Ĝaŭ Ĝihian kaj proponis ke li mem volas doni sian duonmonatan subvencion al li, petante ke li sendu ĝin hejmen kune kun la sia. Sed antaŭ ol la mono estis transdonita, la batalo komenciĝis. . . ." La majoro entiris spiron da cigaredfumo kaj daŭrigis: "Kiu atendis ke kiam mi ankoraŭ ne havis tempon por transdoni la monon al Ĝaŭ, venis informo de hospitalo ke Ju jam mortis pro tro multa sangado!" Kaj li rimarkigis post enspiro: "Kvankam tio okazis jam antaŭ multaj jaroj, tamen ĝi ŝajnas kvazaŭ okazinta nur hieraŭ kiam nun mi ĝin mencias."

Plena silento regis en la kupeo. Aŭdiĝis nur la knarado de la radoj de ekster la fenestroj.

La majoro apenaŭ povis subpremi sian ekscitiĝon. Li stariĝis kaj denove sidiĝis. Post la sidiĝo li restariĝis, murmurante:

"Kia bona kamarado! . . . Malgraŭ sia grava vundiĝo li ankoraŭ memoris donaci la subvencion al alia kamarado. . ." Subite la majoro ekkaptis min kaj fikse rigardis al mi per brilantaj okuloj. Post longa rigardado li diris: "Kie estas Liujiang-gubernio? Ŝajnas al mi ke ĝi ne estas malproksima de la baldaŭ atingota Ĝuĝoŭ. . . ."

"Kio? Ĉu vi intencas iri tien? . . ."

Gravmiene la majoro respondis:

"La kamarado jam oferis sian vivon antaŭ pluraj jaroj. Lia patrino estas nun grave malsana kaj esperas lian revenon. Ĉu ni vivantoj kiuj scias ĉion pri li povus ne iri por viziti ŝin? . . ."

Tion dirante li elkuris al la vagonisto por pride-
mandi la vojon kaj legi landkarton. Reveninte li

rapideme ordigis siajn litajaron kaj valizon, kvazaŭ li estus baldaŭ devagoniĝonta. Li diris:

"Mi jam bone informiĝis. La vojo estas tre oportuna. Mi tute povas iri tien. Devagoniĝinte ĉe Ĝuĝoŭ, mi transvagoniĝos al Ĉangŝa, de kie mi bezonos nur dutagan veturadon per aŭtobuso. . . ."

Mi ĵetis rigardon al la brakhorloĝo kaj sciis ke ankoraŭ restas pli ol unu horo antaŭ ol la trajno alvenos al Ĝuĝoŭ. Ĉu li efektive devagoniĝos ĉe Ĝuĝoŭ anstataŭ veturi al Ŝanhajo por viziti sian amikon kaj al Ĝinan por viziti sian patrinon? Mi multe ekscitiĝis pro lia neatendita decido.

"Kion vi intencas diri kiam vi renkontos la malsanan maljunan patrinon?" mi demandis.

"Ĉio jam pripensita!" Ĉifoje la majoro gaje respondis ridante. "Kiam mi renkontos ŝin, mi diros: 'Avino, via filo Ju Zikiang petis min transdoni al vi informon. Li bone fartas kaj laboras kune kun ni. . . .'"

"Tio. . . ." Miaj okuloj ekmalsekiĝis.

"Por ke la avino estu ĝoja, mi ankaŭ, alportos al ŝi iom da donacaĵoj. . . ."

"Kio estas la donacaĵoj kiujn vi intencas prezenti al ŝi? . . ."

"La donacaĵoj estas pretaj!" la majoro trankvile elprenis la du pakajetojn el la valizo, dirante, "Mi donacos al ŝi ĉi tiujn objektojn."

Ĉu tio ne estas la donacaĵoj kiujn li volas prezenti al sia patrino? Rapide mi transprenis la pakajetojn, malvolvis ilin kaj vidis:

En la unua pakajeto estis tre bela kaj delikata skatolo en kiu sin trovis unu bele desegnita porcelana

Ter-akto

— Tibeta popolkanto —

*Kvankam multas belaj floroj,
sed plej belas roz' ruĝvanga;
kvankam multas dolĉaj fruktoj,
sed plej dolĉas pom' Batang-a.*

*La Popola Registrar' terakton donis al nia
domo —*

*ĝi pli ĉarmas ol la roz', pli dolĉas ol la
pomo.*

*Kvankam multas grandaj lagoj,
tamen Juco plej profundas;
kvankam multas riveregoj,
Jalucampo sin plej longe etendas.*

*Sed la am' de Prezidanto Maŭ kaj la Partio
estas eĉ de des pli granda dimensio.*

Trad. Laŭlum





Mi malvolvis la duan pakajeton kaj trovis en ĝi ankaŭ tre delikatan skatolon, en kiu kuŝis tri belaj brilantaj memorigaj insignoj. Unu el ili estis la "memoriga insigno de transiro de Jangzi-rivero".

bovlo kun orkolora rando, unu desegnita porcelana kulero kaj paro da blankaj manĝobastonetoj el eburo.

Tiam proksimiĝis por rigadi ankaŭ la maljuna inĝeniero kaj la juna patrino. Honteme la majoro klarigis:

"Ne mokridu min. Ili esprimas la deziron de filo kiu volas ke la maljuna patrino estu sana kaj longviva. . . . Ili estas preparitaj por mia patrino."

Ni ĉiuj ridis, sed el la okuloj ĉiuj elridis emociajn larmojn. . . .

Mi malvolvis la duan pakajeton kaj trovis en ĝi ankaŭ tre delikatan skatolon, en kiu kuŝis tri belaj brilantaj memorigaj insignoj. Unu el ili estis la "memoriga insigno de transiro de Jangzi-rivero", kiun ni ĉiuj jam vidis.

"Kamarado majoro! Ĉio ĉi tio estas viaj plej valoraj memorajoj!"

"Jes! Antaŭe mi intencis postlasi ilin ĉe mia patrino, memorigante al ŝi ke ŝia filo jam plenkreskis. . . . Nun mi decidis dediĉi ilin en la nomo de la martiriĝinta heroo Ju Zikiang al lia patrino. Ĉu ne plenkreskis ŝia filo ankaŭ?"

Ĉe tio, neniu el ni povis eldiri eĉ unu vorton. Aŭdiĝis nur senĉesa knarado de la radoj de ekster la fenestroj. . . .

Kiam la trajno alvenis al Ĝuĝoŭ, ni tri, la maljuna inĝeniero, la juna patrino kaj mi, krome la knabeto, ĉiuj devagoniĝis por adiaŭi tiun ĉi kamaradon majoro. Ankaŭ la neparolema inĝeniero, premante la manon de la majoro, kvazaŭ havus parolon neelĉerpeblan. Ripetfoje li konsilis al la majoro:

"Mi donis al vi mian adreson. Post via alveno nepre skribu al mi pri ĉio kion vi spertis tie!"

La juna patrino ankaŭ varme diris:

"Kiam vi vidos la patrino de k-do Ju Zikiang, transdonu por mi mian bondeziron al ŝi. . . . Diru al ŝi ke ŝi estas patrino de ni ĉiuj. Ni ĉiuj zorgas pri ŝi. . . ."

Nun nur la infaneto ne komprenis kio okazis. Li kriegis:

"Enbrakigu min! Oĉjo, enbrakigu min!" Kriante li ĉirkaŭprenis la kolon de la majoro treege intime.

Vidinte ĉion tion, mi nereteneble demandis al la majoro:

"Ĉu vi volas ke ni faru ian servon por vi, kamarado majoro? Ĉu vi ne diris ke vi ankoraŭ vizitos amikon en Ŝanhajo?"

La majoro hezitis momenton kaj respondis iom ruĝiĝinte:

"Antaŭe mi intencis sendi leteron post devagoniĝo. Nun mi petas vian helpon! Mia edzino venos al la stacidomo de Ŝanhajo por renkonti min. Ni jam por tri jaroj ne vidis unu la alian. Mi ne devas kolerigi ŝin. Kiam vi renkontos ŝin, diru bonvole al ŝi, kial mi ne povas veni per tiu ĉi trajno kaj devis devagoniĝi."

La apudestaranta juna patrino demandis:

"Kiel ni povos rekoni vian edzinon?"

"Estas facile!" respondis la majoro. "Jen estas ŝia foto."

Pli rapidmova ol ĉiuj aliaj, la juna patrino forkaptis la foton. Rigardante ŝi diris:

"Nu, tia belulino ja estas facile rekonebla je ekvido."

La majoro ankoraŭ diris maltrankvile:

"Vi povas ankoraŭ demandi ŝin, ĉu ŝi venas renkonti k-don Hia Ĵen. Kiam vi mencios mian nomon, ŝi tuj komprenos. . . ."

Tiutempe la lokomotivo ekfajfis. La juna patrino redonis la foton al la majoro kaj reprenis de li sian infaneton. Ni ĉiuj survagoniĝis.

Disiĝante kun bedaŭro, ni kriis:

"Rapide iru kaj rapide revenu, k-do Hia, bonan vojaĝon!"

Ankaŭ la infaneto kriis:

"Oĉjo! Oĉjo! liberigarmeaa oĉjo!"

Tiam la lokomotivo refajfis. La juna majoro estis ankaŭ mansvinganta al ni.

*Trad. de Pandiŝo
Ilustraĵoj de A Laŭ*

Mi Retrovis Nian Pliĝan Franjon

ĈIUJARE kiam unuafoje ekflirtas neĝflokoj, mi tuj ekmemoras iun virinon — kun beleta vizaĝo, alta staturo kaj afabla aspekto. Ŝi estis mia pliĝa franjo. Ni ĉiuj en la teatra trupo Signalfajro tiel ŝin nomis. Efektive ŝi ne estis la plej aĝa el ni ĉiuj; ni tiel ŝin nomis nur ĉar ni ŝin amis kaj estimis.

Mi vivis kun ŝi ne tre longe, sed ŝi donis al mi neforgeseblan impreson. Ŝi zorgis pri mi, helpis min kaj komprenigis al mi diversajn principojn de la revolucio. En la pasintaj dudek jaroj, mi klopodis ŝin trovi per diversaj rimedoj, sed tute vane.

Iun tagon, subite venis al mi la ideo, ke la popola polico, dank' al kies klopodo multaj familioj retrovis siajn parencojn, eble povas min helpi. Mi skribis leteron al la policejo. En la tria tago, kiam mi eniris matene en mian oficejon, la policejo informis al mi per telefono ke oni jam trovis ŝin por mi.

Senprokrastre mi telefonis al la pliĝa franjo. Kiam la konata voĉo eksonis en miaj oreloj, mi tiel emociiĝis ke mi apenaŭ povis reteni miajn larmojn. La vivo antaŭ dudek jaroj reaperis en mia cerbo sceno post sceno kiel ludata filmo.

Mi renkontis ŝin unuafoje en la jaro 1939, kiam mi aliĝis al la nomita teatra trupo Signalfajro.

Mi estis tre maltrankvila pro tio ke mi devis iri sola al fremda loko, kaj la neĝo senĉese flirtanta pli maltrankviligis min. Transirinte Jan-riveron mi alvenis al Kiaŭrgoŭ, kie troviĝis la sidejo de la teatra trupo sur la deklivo de la Orienta Monto. Mi renkontis ŝin tuj atinginte la pordon. Ŝi estis junulino ĉirkaŭ dudek-jara vestita en griza militista uniformo. Ŝia hararo kovrata de la kepo, kaj ŝiaj leda zono kaj tibiingo en tre bona ordo. Kun rideto ŝi metis sian manon sur mian ŝultron: "Kiun vi volas vidi, fraĉjo?" Ŝia varmeco preskaŭ povis degeligi la neĝon. Kaj mia timemo tuj neniĝis.

"Mi estas alsendita labori tie ĉi," mi diris.

"Ĉu vere? Mi konduku vin al la asistanto."

Ekvidante min, la asistanto ekkriis tuj: "Bone! Ankoraŭ unu diableto* aldoniĝas al ni!"

Mi ekridis ankore ke li, estante nur dekok-naŭ jara, nomis min diableto.

"Kompreneble, li iru al la taĉmento de diabletoj."

Ni eniris kavernoĉambron, kies terlito kaj terplanko estis plenplenaj de diabletoj. La asistanto diris varme al ili ĉiuj: "Ni bonvenigu la novan kamaradon!"

Post ilia aplaŭdo li diris al mi: "Demetu vian pakajon!"

Apenaŭ li finis sian vorton, la diabletoj ĉiuj ekvarmis al mi, kaj konkuris malligi por mi la pakajon, dum mi ĝin tenis firme.

"Kio estas al vi, etulo?" la asistanto demandis zorgeme.



Mi renkontis ŝin tuj atinginte la pordon.

Ilustraĵoj de Huang Gonggjun

Alte mi paŭtis: "Mi ne volas dormi kun la knaboj!"

"Pro kio?" ekmiris la asistanto.

Tuj ruĝiĝis mia vizaĝo: "Mi ja ne estas knabo!"

Ĉiuj eksplodis per brua ridego kaj la pliĝa franjo tuj ĉirkaŭprenis min: "Oh, franjeto vi estas!"

Tiunokte mi dormis kun ŝi sub unu kovrilo.

Ĉiuj gekamaradoj en la trupo estis bonaj al mi, sed mi plej ŝatis la societeton kun la pliĝa franjo. Kiam mi marŝis, mi persistis iri kune kun ŝi. Estis sufiĉe lacige piediri 40-45 km. ĉiutage. Suprenirinte montojn, mi ofte deziris eksidi kaj restadi senmove. Tiam la pliĝa franjo proksimiĝis al mi kaj diris: "Metu vian manon sur mian pakajon kaj vi piediros pli facile." Sed mi ankoraŭ iris tre malfacile. Ŝi do rakontis al mi pri la batalo de Pinghing-pasejo, pri la grimrado de neĝaj montoj, la trairedo de la Marĉa Herbejo kaj la Longa Marŝado de diabletoj en la ruĝa armeo. Aŭskultante plenatente ŝiajn rakontojn mi ekforgesis mian lacon.

* Tiel oni karese nomas la infanajn membrojn en la revoluciaj trupoj.

Iuj kamaradoj ŝerce min nomis ŝia vosteto, tamen mi neniom koleriĝis; mi ja volis esti ŝia vosteto.

Tiam ĉiuj rigardis min tro juna, kaj mi intence min ŝajnis tia por profiti la favoran konsideron, kaj mi postulis senfinan favoron de aliaj. Foje iu kamaradino ne aŭdis klare mian diron; mi forte kritikis ŝin, sed ŝi ne akceptis ĝin. Mi do riproĉis ke ŝi traktas min malbone, ekploregis furioze kaj ruliĝadis sur la tero, kaj neniu povis ĉesigi min. Tiam la pliaĝa franjo sidiĝis apud mi kaj ekordigis mian hararon per sia mano. Mi tuj ĉesis furiozi, kaj kuŝis en ŝia sino ploretante kvazaŭ maljuste traktita.

Tiam mi pensis ke ŝi certe klopodos min konsoli, sed neatendite ŝi portis min al la ebenajo sur la deklivo, kaj kun malofta severeco ŝi diris al mi: "Diablero, ne plu estu tiel, poste. Vi jam ne estas ordinara bubino, sed jam fariĝis revolucia armeano, batalantino. Ĉu vi ne aŭdis de la trupestro, ke vi estas etaj revoluciuloj? Revoluciulo devas servi al la popolo. Kion ajn farante, vi nepre devas pensi pri la aliaj, pri ĉiuj. . ."

La luno glitadis post maldikaj nuboj kaj vespera venteto karesadis miajn vangojn. Mi meditado pri ŝiaj vortoj: "Kion ajn farante, vi nepre devas pensi pri la aliaj, pri ĉiuj." Sed mi pensis nur pri mi mem, mi nur postulas ke la aliaj zorgu pri mi. Ĉu tio ne estas egoismaĵo?

Ŝi rigardis al la malproksimo kun sia kapo levita kaj unu el la manoj sur mia ŝultro. Denove vibradis ŝiaj amemaj vortoj en mia koro:

"La proleta solidareco estas kvazaŭ suno kaj luno, kiuj brilas ne sur unu sola homo. . ."

Tiam mi subite ektrovis ke la pliaĝa franjo estas bona ne nur al mi sola, kaj tio estas la kialo ke ĉiu ajn nomis ŝin pliaĝa franjo.

Post kelkaj tagoj kiam ni devis provludi teatraĵon, oni volis ke mi ludu la rolon de knabino, kaj Ĉang-hua la rolon de ties frateto. Ja ne estis malfacile por mi ludi la rolon de knabino. Sed ĝena por mi estis la prezentenda jango-danco, ĉar kiam mi estis hejme, miaj geavoj rigardis min kvazaŭ knabon, kaj mi nur ŝatis grimpi sur ŝnurojn aŭ arbojn, kaj malplaĉis al mi la koketaĵoj de la knabinoj.

K-do Mi jam ekludis la *huĉin-on**, k-do Gaŭ Bo instruis foje-foje kaj Ĉanghua jam komencis danci, tamen mi ne paŝis antaŭen. Ĉang Dingjuan kaŝe kuntiris sian nazon por hontigi min: "Hm! eĉ tiel hontema, ĉu propagandanto povas ne prezenti teatraĵon?!"

Sed senvoĉe mi diris en mia koro: "Sed tiun ĉi rolon mi nepre ne ludos!" Ĝuste tiam alvenis la pliaĝa franjo kaj ŝi tuj trovis la kaŭzon.

"Kio estas?" kondukinte min flanken, ŝi diris al mi per sia serena ĝoja voĉo: "Ĉu vi forgesas kial vi partoprenas la revolucionan laboron?"

"Mi alvenas nur por rezisti la japanon, sed ne prezenti teatraĵojn."

"Rezisti la japanon estas por la bono de la popolo, prezentado de teatraĵoj estas por propagandi al la popolo la rezistadon kontraŭ japanon, do ankaŭ tio estas por la bono de la popolo. Por la revolucio oni povas eĉ oferi sian vivon, pro kio do ne forigi la hontemon? La jango-danco estas facile lernebla, populara kaj plaĉa al la popolamaso. . . . Jen tiel, tute simila al irado, necesas nur ŝanĝeto al tio. Jen vidu, tiel, tiamaniere. . ."

Mirinde estis ke mi ekdancis senkonscie laŭ ŝia ekzemplo. Kiam la prezentado okazis sur placo, tre multe da spektatoroj ĉeestis. Ili senĉese aplaŭdis, kaj kriegis: "For la perfidulojn! For la japanajn imperiistojn!" Tiel mi ĝojegis ke la koro forte batadis senĉese. Nun mi jam bone komprenis kion signifas la prezentado de teatraĵo.

Estis la tago de Infana Festo, kiam ni marŝis sur la bordo de la Flava Rivero. La gvidantaro aranĝis por ni kunvenon de paroladoj kaj la gekamaradoj ankaŭ pretigis por ni multajn donacaĵojn. La sola infano el la kamaradinoj estis mi, kompreneble, mi devis esti la oratoro. Tamen mi ne sciis kion mi devis diri. Mi ekvolis retiriĝi antaŭ la malfacilaĵo, tamen la pliaĝa franjo helpis min: "Kion faras la geknaboj de via aĝo, se ili vivas en la hejmo?"

"Ili ludas volanon, manĝas sukeran pupon, petolas kaj interbatalas. . ."

"Sed la diablero en la Ruĝa Armeo. . .? Nu, vi parolu pri tio."



"La proleta solidareco estas kvazaŭ suno kaj luno, kiuj brilas ne sur unu sola homo. . ."

* *Huĉin-o*—ĉina dukorda muzikilo ludata per arĉo.



Somero de la Muziko

— Muzika vivo en Pekino —

EN la pasinta somero okazis unu post alia diversaj koncertoj en la Muzika Halo de la Parko Sun Jatsen, en la aŭditorio de la Centra Konservatorio, sur la lageto de Bejhaj-parko kaj en aliaj grandaj teatroj. En aŭgusto je la inaŭguro de la Pekina Muzika Halo okazis dek koncertoj kun pli riĉenhava programo. Multe da muzik-amantoj diris ke la ĉijara somero estas “somero de la muziko”.

Krom koncertojn miksitajn de kantoj kaj instrumentaj ludoj kaj tiujn de solistoj, la pekinaj muzik-kunvenoj en la somero inkluzivis ankaŭ individuajn koncertojn de famaj muzikludistoj kaj kantistoj. Por kontentigi la malsamajn gustojn de la publiko, oni aranĝis ankaŭ koncertojn ekskluzivajn de simfonioj, malpezaj muzikaĵoj, ĥoroj, historiaj kantoj kaj muzik-

pecoj el fremdlandaj operoj. En tiuj koncertoj profesiaj kaj amatoraj muzikistoj ludis centojn da muzikaĵoj kun diversaj temoj kaj malsamaj stiloj, grandaj kaj malgrandaj, ĉinaj kaj eksterlandaj, antikvaj kaj nuntempaj.

En la “gestokantado de historiaj kantoj”, aktoroj de la Ensemblo de la Politika Fakto de la Aeraj Fortoj montris viglan politikan entuziasmon kaj relative altan nivelon de prezenta arto, kaj iliaj kantoj sonis potence kaj kortuŝe. Ambaŭ la forteritma *Ribelo dum Aŭtuna Rikolto* kaj la sonora kaj alttona *Akompani la Edzon al la Ruĝa Armeo* sentigis al la aŭskultantoj la malfacilan bataladon en la jaroj revoluciaj.

La teatroj ĉiam estis plenaj kiam ili ludis simfoniojn. Ma Sicong, fama komponisto kaj violonisto, persone direktis la ludon de lia nova verko *La Dua Simfonio*. Sub la direktado de la komponisto Li Huangi mem, oni ludis lian unuan simfonion *Heroa Insulo*. La *Simfonio de Tempesto*, kolektive kom-

La kunvenejo estis placo sur la bordo de la Flava Rivero, kaj kiel pupitro servis kruda tableto. Kiam mi alpaŝis kaj ekrigardis malsupren, tuj mi forgesis ĉion, kion mi intencis paroli. Mi jam intencis retiriĝi, kiam subite mi aŭdis kuraĝigajn vortojn de la asistanto:

“Parolu, diableto! ja sufiĉe bone vi preparis, ĉu ne?”

Mi ree kuraĝiĝis. Levinte la kapon, mi vidis la amemajn okulojn de la gekamaradoj min kuraĝigantaj. Ekvidante la varmplenajn okulojn de nia pliaĝa franjo, mi tuj ekmemoris la rakontojn, kiujn ŝi rakontis al mi.

Mi parolis pri la rakontoj tiel flue kvazaŭ mi persone vidu la aktivadojn de la diabletoj dum la Longa Marŝado: alvenante la kampadejon post tuttaga irado ili ankoraŭ preparis litojn kaj varman akvon por la kamaradoj; ili marŝis same kiel ĉiuj aliaj, tamen ili dancis kaj kantis por agiti la aliajn; la batalantoj lernis, iris al klaso, kaj sturmis en batalo laŭ ilia trumpetado. Kiom da bandaĝoj iliaj manetoj lavis kaj kiom da valoraj vivoj ili jam savis. . . .” Mi diris:

“Gekamaradoj, la temo de mia parolado estas: Kiel daŭrigi la gloran tradicion de l’ ruĝaj diabletoj. . . .”

Muĝis ventego, torentis la Flava Rivero, kaj en mia brusto ekleviĝis entuziasmo kiel ondegoj.

Forpasis jam dudek jaroj, sed ĉio ĉi tio kvazaŭ

okazis nur hieraŭ.

Mi antaŭe aranĝis kun la pliaĝa franjo intervidi post la vespermanĝo. Kiam mi alvenis antaŭ la pordo de ŝia loĝejo, dika kamaradino paŝis renkonte al mi kun rideto, metis sian manon sur mian ŝultron, kaj kvazaŭ ŝercante ŝi diris: “Kiu vi estas?”

La mano sur mia ŝultro estas tre tre bone konata al mi! Mi min ĵetis en ŝian sinon, spite al tio ke mi kunportis mian infanon ĉe mi.

Ŝi varme akceptis min, kaj montris al mi multajn fotojn, ke mi elektu iun el ili por memoraĵo. Sed ilin trarigardinte mi diris: “Neniu el ili similas al vi, do neniun mi volas!”

“Vi pensas ke mi maljuniĝis, ĉu ne? Tio estas laŭ la leĝo de la naturo. Sed se oni restas energiplena, por kio do gravas la forpasado de la juneco?”

Blankas la haroj sur ŝiaj tempioj, kaj ŝia vizaĝo pleniĝas de sulkoj. . . . Ĉio ĉi tio montras, kiom da energio ŝi oferis al la revolucio.

Refoje mi atente rigardis ŝin kaj klopodis trovi postsignon de la pasinteco, sed tute vane. Je nenio tiu ĉi similas al mia juna, ĉarma franjo! Sed je unu afero ŝi ankoraŭ same kiel en la pasinteco — la tolaj ŝuoj kaj grizaj vestoj. Mi diris pretervole: “Kial vi ankoraŭ portas. . . .”

“La malnovajn vestojn, ĉu ne?” ŝi daŭrigis mian nefinitan rimarkon. “Ĉion ajn ni povas forlasi, sed nepre ne la Jan’anan manieron!”

ponita de Ĝang Kongfan, Luo Ĝongjong, Jang Mujun, k.a. estis denove prezentata al la publiko post revizio. Tiuj ĉi novaj verkoj, tinkturitaj per densa nacia koloro, spegulas diversmaniere la entuziasmigan realan vivon. Rilate al fremdlandaj simfonioj, oni ludis unuafoje en Pekino la *Kvinan Simfonion* de Ŝostakoviĉ. Dank' al la lerta ludo de la simfonia orkestro de la Centra Muzika Ensemblo kaj al la sukcesa direktado de Li Delun, tiu koncerto lasis al la aŭskultintoj profundan impreson. La Centra Muzika Ensemblo ludis ankaŭ simfonion de Franck, franca komponisto el la 19-a jarcento.

La facilaj, graciaj kaj viglaj malpezaj muzikajoj altiris pli da aŭskultantoj. Kiel la ĉinaj *Ekfloro en Printempo*, *Kanto de Knabino* kaj *Valso de Somera Nokto*, tiel ankaŭ la fremdlandaj *Blua Danubo*, *Siponie*, k.a. ĉiuj akiris grandan sukceson. La Centra Nacimuzika Ensemblo ludis *Printempon en Suda Hingiang* per ok malsamaj plukataj instrumentoj kiuj estis tre bone harmoniigitaj kaj samtempe ĉiuj elmontris siajn apartajn karakterojn. Tiu ĉi programero ĉiufoje gajnis varmajn aplaŭdojn de la publiko.

Ekzakta, subtila, stabila kaj kapabla atingi certan profundecon kaj imagon — jen estis pritakso de la publiko pri la kantarto de la lirika koloratura sopranistino Ĝang Ligjuan. En la kantado de *Kion Babilas la Gejunuloj en Arba Ombro?* de Ĉajkovski, ŝi laŭ klare distingitaj gradoj esprimis en tiu romano per hela voĉo kaj klara muziklingvo la strebadon al amo kaj belan revon de la gejunuloj en la unua enamiĝo. La individuaj koncertoj de aliaj fame konataj muzikludistoj, kiel ekzemple Jang Bingsun, Lin Kehan kaj Vu Jili, kaj la koncerto de kordinstrumentoj ludataj de la kvar fratoj Lin Keĉang, Lin Kehan, Lin Keming kaj Lin Keding ebligis al la publiko koncentre ĝui la malsamajn stilojn de tiuj solistoj kaj verkoj de diversaj muzikskoloj.

En ĥoraj koncertoj oni aŭskultis *Eĥon, Pastoralon* kaj aliajn ĥorajojn sen akompano, kiuj plene montris la arton kaj belecon de la ĥorkantado. Kiam la kantoj finiĝis, ili ŝajne ankoraŭ postsonoris en la oreloj kaj lasis agrablan postĝuadon.


En la solista koncerto de novaj komponaĵoj aranĝita de la Ĉina Muzikista Ligo, oni ludis *Drinke-mulon* kaj ceterajn antikvajn muzikajojn ĵus elfositajn de la Pekina Instituto de Antikva Sepkordo. Oni ankaŭ aŭskultis la violonan koncerton *Printempo* de Ju Liĉun kaj aliajn novajn komponaĵojn.

En la Koncerto de Junaj Pioniroj aranĝita de la dependa mezlernejo de la Centra Konservatorio, oni ludis la *Trian pianan koncerton* de Kabalevski, nuntempa komponisto de Sovetunio. Tiu koncerto postulas komplikan ludteknikon, sed la knaboj, post dumonata ekzercado, fine sukcesis ĝin prezenti al la publiko. Veteranaj muzikinstruistoj, kiel ekzemple Jang Dagjun, Jing Ŝangneng, Ĝiang Fengĝi, Ĝang Kingkjuan kaj Hong Dalin, kaj aliaj muzikinstruistoj de la Pekina Arta Instituto ankaŭ aperis sur la scenejo kaj majstre ludis pibaon*, erhuon*, pianon kaj solkantist kiel baritono kaj tenoro, k.t.p.

Helpe de profesiaj muzikistoj, la arto de iuj muzikamatoroj rimarkinde progresis. Ĉe la inaŭguro de la Pekina Muzika Halo, la Pekina Amatora Grupo de Nacimuziko okazigis sian unuan koncerton, kiu estis bone akceptita de la publiko. La Grupo nombras pli ol cent personojn, kiuj estas laŭprofesie laboristoj, oficistoj, ŝtataj kadroj kaj studentoj; helpataj de la Centra Nacimuzika Ensemblo, ili jam mastras la teknikon de ludado de nacia muziko.

Krome oni ankaŭ aŭskultis koncerton de pola pianistino Maria Wilkomirska kaj kantadon de Japana Ĥoro.

* Pibao — ĉina plukata instrumento; erhuo — ĉina dukorda muzikilo ludata per arĉo.



Granda ĥorajo: "Vivu Patrolando", unu el la programeroj de la prezentado por celebri la 40-an fondiĝan datrevenon de la Komunista Partio de Ĉinio. Foto de Hinhua


Arda Prikantanto de l' Nova Vivo

— Pri la artkreaĵoj de pentristo Ŝaŭ Ju —

Vespera prezentado de produktbrigado de agrikultura Popolkomunumo.

ŜAŬ Ju, unu el la multnombraj pentristoj kiuj kreskis kun la popola revolucio, estas laŭdata pro sia profunda penso, akra observo kaj originala stilo. Liaj verkoj de fruaj tempoj jam montriĝis intime ligitaj kun la vivo de la laboranta popolo, kaj ili esprimis precipe la profundan simpatian kiun li havas por la vasta amaso de la kamparanoj.

Depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, grandega ŝanĝiĝo okazis en la ĉina socia vivo. Kun la dum longa tempo akumula riĉa vivsperto kaj de antaŭe bone kulturitaj penso kaj arto ekzaltitaj de la reala vivo, li multe pentris pri la revolucia vivo kiun li persone spertis, kaj samtempe li plenpasiie prikantis la novajn homojn kaj novajn aferojn kiuj aperis amase en la vivo. Lia serio da skizoj pri la ĉefurbo estas verkoj kreitaj dum tiu periodo. Li estas tre sentema pri la novaj aferoj; kio ŝajnas banala por la aliaj, tio tamen fariĝas atentinda



sub lia peniko; ĉie videblaj ĉiutagaĵoj ofte ricevas novan signifon sub liaj strekoj kaj tuĉoj. Tiun valoran talenton la pentristo ankoraŭ konservas en la lastaj jaroj, kaj liaj temoj de pentrado jam ege plimultiĝis. En tiuj jaroj li faris skizojn pri tre diversaj temoj: kaj pri enlando kaj pri eksterlando, kaj pri la ĉefurbo kaj pri la limregiono, kaj pri la socialisma reformo kaj pri la socialisma konstruado, kaj pri la gravaj amasmovadoj kaj pri la ĉiutaga vivo, kaj pri teatra prezentado kaj pri pejzaĝoj kaj senvivajoj. . . ., liaj verkoj multflanke spegulas nian epokon kaj havas klaran koloron de la epoko.

Ŝajnas ke multajn el siaj verkoj li pentris tute hazarde kaj spontanee, kaj restas en ili nenia signo de zorga prilaborado. Sed estas ne malfacile por la atentemaj rigardantoj trovi kiom lerta estas la pentristo en elfosado de la esenco de vivo el ĝiaj fenomenoj ke liaj verkoj estas tiom sencoplenaj kaj multe pensigaj. Ekzemple la pentraĵoj *Inaŭguro de Komunumo en Suna Tago*, *Multaj Estas la Modelaj Virinoj en Dianbaj*, *Alsendo de la Novedzino* k.c. kiujn li faris dum sia lastatempa vojaĝo en la sudo, ĉiuj prikantas en diversaj flankoj la feliĉan vivon de la nova socio kaj la brilan perspektivon kiun malfermis al la kamparanoj la Ĝenerala Linio, la granda antaŭensalto kaj la popola komunumo. Al la pentraĵo *Alsendo de la Novedzino* estas alskribita la jena versaĵo: "Pasintecce filinon oni edzinigis ne al sablejo, kie kampo fariĝis duno, tero senfrukta kaj homo malriĉa; nun tie,



Novaj kaj malnovaj vestoj kune pendas por sekigo — du malsamaj epokoj.



PENTRAJOU
DE
SAŨ JU

Moskva Pejzaço

La Printempo Tuj Venos.





Ĉe Marbordo




1954.7.18 成渝線上

Sur la Fervojo Ĉe

Giganta Arbo



Anserejo





lu-Congking-a



Proviz-venda Kooperativo



Bonvenigi Novedzinon

Vertical text on the left margin, possibly a page number or a small note, written in Chinese characters.



La Rivero Suĝou (en Ŝanhajo)



Matena Foiro

arbaroj densas, fiŝo abundas kaj la kamparo fekundas. Kaj filinon oni edzinigas al Bohe-o." Tio ĉi montras kiom granda kaj radika estas la ŝanĝiĝo kiu okazis en la vivo de la kamparanoj en la nova socio, kaj donis al tiu ĝenro profundan signifon. Tia lerteco por prezenti la grandon pere de malgrando, "vidi la mondon tra sablero" montriĝas ĉie en la verkoj de Ŝaŭ Ju. Eĉ ĉe tia ĉiutagaĵo kia sunsekigo de vestoj kun plej malmulte da sugesto el la vivo povis inspiri al la pentristo krei la pentraĵon kia *Novaj kaj malnovaj vestoj kune pendas por sekigo — du malsamaj epokoj*. La alloga forto de la verkoj de Ŝaŭ Ju kompreneble devenas de lia lerta kombinado de pentrarto kun poezio. Liaj admirinda pensmanovrado, kaj riĉa ideasocio ofte esprimiĝis harmonie tra kombino de pentrarto kun poezio. La kombino de poezio, belskribo kaj pentrarto jam delonge estas la bona tradicio de la pentrarto en nia lando, kiun Ŝaŭ Ju lernis apliki al siaj verkoj, tiel ke ili estas des pli ŝatataj de la rigardantoj.

"Arto perfektigis el diligentado." Ŝaŭ Ju estas pentristo diligenta en verkado. De multaj jaroj, okupate de gvidaj laboroj en la Unuiĝo de Ĉinaj Artistoj kaj ŝtata eldonejo, li tamen neniam ĉesis manipuli sian penikon en liberaj horoj. Li kom-

prenis ke la politike progressa enhavo de la artaĵo devas unuiĝi kun formo kiel eble plej bela. Lia pentra stilo fariĝas pli kaj pli varma, klara, serena, lakona tamen ideplena, kaj tre variaj estas la manieroj de liaj penikotuloj kaj kolorado. Li diligente faradis fundamentan ekzercadon de pentrarto, sekve li povas atingi pli altan nivelon de distilado kaj ĝeneraligo. Jen per kelkaj simplaj linioj li konturigas la esencan formon de objekto, jen per pecoj da simplaj koloroj li formis la tutan pentraĵon, ĉiam tiom aŭdace, originale kaj nebrideble. Li mastras la leĝojn pri pentrado per kraĵono, karbokraĵono, akvo-farboj, akvopulvoraj koloriloj, plumo, . . . kaj pri tradicia ĉinstila pentrado kaj la uzadon de ĉiuj iliaj instrumentoj, dank' al longtempa, diligenta praktikado. De lastaj jaroj, li forte

strebas por mastri la tradician ĉinstilan pentrarton, kaj ankaŭ jam atingis rimarkindan sukceson.

Varieco, lakoneco sed neniom da devio de la vereco estas la karakterizaĵoj de liaj verkoj; la diverseco en formoj kaj manieroj de lia esprimado ne nur ne devigigas lin de prezentado de la enhavo, sed male, li ĝuste per tio ĝin pliforte esprimas. Tiel Ŝaŭ Ju faras siajn skizojn fidele prezentante la vivon, diference de nura kopio de la objektaj aferoj, kaj spegulante ne nur la buntan kaj riĉan vivon de nia epoko kaj ankaŭ formante riĉan idean mondon en la verkoj. Se estus permesite fari komparon, mi povus diri ke ĉiu el liaj verkoj tre similas al arieto sonanta el diversaj muzikiloj, kiuj kune fariĝas grandioza sinfonio, saturita de epoka spirito, kaj sonanta en forta voĉo de la epoko.



Fiŝrikolto

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Provaj Demokratiaj Elektaj en Tibeto jam Deciditaj

En la pasinteco, Tibeto estis malluma socio de feŭda servuta sistemo, en kiu la laborantaj popoloj havis nenian demokratian rajton. Nun, post demokratia reformado, jam maturiĝis kondiĉoj por ĝenerala elektado en la plejparto de la regiono. La 14-a sesio de la Konstanta Komitato de la Prepara Komitato de la Tibeta Aŭtonoma Regiono jam decidis

fari provan demokratian elektadon en certaj lokoj en la tria sezono de la kuranta jaro por fondi diversgradajn kongresojn de popolaj reprezentantoj kaj popolajn komitatojn.

Eksterlandaj Famaj Verkoj en Ĉinio

Lastatempe, la Komerca Presejo, kiu okupiĝadas speciale pri eldonado de klasikaj verkoj, eldonis nombron da tradukaĵoj de

gravaj fremdlandaj filozofiaj kaj soci-sciencaj verkoj, por ke la ĉinaj studentoj de la koncernaj fakoj povu kritike heredi la eksterlandajn kulturajn heredajojn. Interalie jam aperis *Filozofio de Rajtoj* de (G.W.F.) Hegel, *Biografio de Charles Fourier* kaj *Protokolaro de la Kunvenoj de la Pariza Komunumo*. Baldaŭ eldoniĝos aliaj verkoj de Hegel, David Richardo, P. J. Proudhon, Montesquieu, Fourier, Saint-Simon, R. Owen, k.a.

Navigisto Ĝeng He



Mogadiŝo — la ĉefurbo de la Respubliko de Somalio sur la orienta bordo de Afriko.

Dum siaj sep marvojaĝoj Ĝeng He detale notis la trapasitajn navigajn liniojn kaj desegnis mapojn, kiuj formis la verkon *Navigaj Mapoj de Ĝeng He* kun dudek mapoj en kvardek paĝoj. En la verko troviĝas kompare fidindaj priskriboj pri la navigaj direktoj kaj vojoj, halt-havenoj, la lokiĝo de rifoj kaj malprofundejoj ktp. Ĝi estas la unua maparo en nia lando pri oceanoj kaj maroj. Ankaŭ Ma Huan, Fej Hin, Gong Ĝen kaj aliaj kunveturantoj de Ĝeng He verkis laŭ siaj propraj travivaĵoj *Vidindaĵo de Oceana Ekstremo*, *Vidaĵoj en Oceana Vojaĝo*, *Notoj pri la Okcidentaj Fremd-landoj* kaj aliajn verkojn pri geografio, popolaj kutimoj kaj moroj de aziaj kaj afrikaj landoj. Ĝeng He kaj liaj kunveturantoj ne nur profitis la navigajn sciojn, longtempe kolektitajn de la ĉina popolo, sed ankaŭ faris gravan kontribuon al la naviga historio de Ĉinio: ili unua-foje malfermis la vojon kondukantan al la orienta bordo de Afriko, riĉigis navigajn kaj geografiajn sciojn de nia popolo pri la diversaj lokoj de la Sudaj Maroj, la Hinda Oceano, Azio kaj afriko.

**Per tio ĉinoj aludas pri la Okcidento, kaj per la Orienta Oceano pri Japanio.*


EN la komenco de la dekkvina jarcento Ĝeng He direktis grandan ŝiparon el pli ol sesdek ŝipoj kun pli ol dudek mil personoj, veturadis sur la Sudaj Maroj, la Hinda Oceano kaj la Araba Maro kaj vizitis pli ol tridek landojn de sud-orienta Azio kaj landojn sur la orienta bordo de Afriko. Tio estis la famaj vojaĝoj de Ĝeng He al la Okcidenta Oceano.*

Ĝeng He estis enoficigita kiel ĉambelano-eŭnuko dum la regado de la dua imperiestro de Ming-dinastio. Lia nomo estis propre Ma Sanbaŭ, tial oni tradicie nomis lin Eŭnuko Sanbaŭ.

De 1405 ĝis 1433 p.K. Ĝeng He sep-foje marvojaĝis. En la de li direktita ŝiparo troviĝis ŝipegoj kun longeco de pli ol 150 metroj, larĝeco de pli ol 60 metroj kaj spaco por mil personoj. Inter la pli ol dudek mil ŝipanoj sintrovis divers-specaj teknikistoj. Krom la navigaj sintrovis maristoj, administraj, tradukaj, medicinaj k.a. specialistoj.

La ŝiparo, direktita de Ĝeng He, spitante malfacilajojn kaj danĝerojn tien kaj reen transveturadis la vastajn marojn, por entute dudek ok jaroj. Ĝi atingis sude ĝis Java (nuna Indonezio), okcidente ĝis





La marvojaĝoj de Ĝeng He formis brilan paĝon en la historio de amikeco de Ĉinio kun aliaj aziaj kaj afrikaj landoj. Tiuj vizitoj akcelis interfluan ekonomio kaj kulturo inter la popoloj de la vizititaj landoj kaj Ĉinio kaj sekve pliigis ilian amikecon. Dum la vizitoj de Ĝeng He estis alportitaj al la popoloj de Azio kaj Afriko ĉinaj silkajoj, porcelanaj, bronzaĵoj, feraj kaj aliaj objektoj por ĉiutaga uzado kaj produktaj instrumentoj, tre ŝatataj de tieaj loĝantoj. Tial dum siaj vizitoj Ĝeng He estis varme akceptata de ili. Kiam Ĝeng He kaj liaj akompanantoj atingis Ĝanĉeng (nun parto de Vietnamio), ĝia tribestro venis eksterurben rajdante sur elefanto kune kun siaj divers-

gradaj subestroj rajdantaj sur ĉevaloj por ilin bonvenigi. Antaŭe kaj poste la estrojn eskortis trupo de kvincent personoj, kiuj aŭ portis armilojn, aŭ svingis ledajn ŝildojn aŭ frapis tamburojn, aŭ blovis kokosŝelajn kornojn. Ili venis al bordo kaj tie okazigis varmegan bonvenigan ceremonion. (Legu en *Vidaĵoj en Oceana Vojaĝo*) Ĝeng He kaj liaj kunveturantoj Hoŭ Hian k.a. atingis Bengalon de Hindio, tiea reĝo tuj sendis sian ministron kun miloj da personoj al la haveno por bonvenigi ilin kaj akompanis ilin ĝis la palaco de la reĝo. Ĉe la pordo de la palaco ili estis solene bonvenigataj ankaŭ de impona palaca gvardio de honoro: ekstere staris soldatoj kun kaskoj, glavoj, pafarkoj kaj sagoj; interne viciĝis pli ol mil kavalerianoj kaj antaŭ la palaca halo viciĝis ankaŭ centoj da elefantrajdantoj. La reĝo sidis en la halo kaj la ministroj, kun arĝenta aŭ ora bastono en mano, kondukis Ĝeng He kaj liajn akompanantojn iri malrapide en la palacegon. Kaj post interŝanĝo de donacaĵoj la reĝo regalis la ĉinajn honorajn gastojn per riĉa bankedo. (laŭ *Vidaĵoj en Oceana Vojaĝo*) Informiĝinte pri la alveno de la ĉina ŝiparo, la reĝo de Aden sur la Araba Duoninsulo tuj kondukis siajn divers-gradajn subestrojn ĝis la mara bordo por bonvenigi. (laŭ *Vidindaĵoj de Oceana Ekstremo*)

De multaj landoj venis senditoj post vizito de Ĝeng He por starigi amikecon kaj komercan interrilatojn kun Ĉinio. De tiam la komunikado de Ĉinio kun aliaj aziaj kaj afrikaj landoj pli kaj pli oftigis.

La vojaĝoj de Ĝeng He havis profundegan influon en aziaj kaj afrikaj landoj, precipe en landoj de la Sudaj Maroj. En ili ĝis nun ankoraŭ tradicias legendoj pri Ĝeng He kaj restas memoraroj pri li. En Tajlando troviĝas "Sanbaŭ-haveno", "Sanbaŭ-templo" kaj "Sanbaŭ-pagodo"; en Malako de Malajo, "Sanbaŭ-urbo", "Sanbaŭ-puto"; en Java de Indonezio estas ankaŭ "Sanbaŭ-templo", "Sanbaŭ-puto" kaj multaj lokoj portantaj la nomon de Sanbaŭ, inter kiuj estas la urbo Samarang (Sanbaŭlong).

Granda kaj Malgranda Vorto

Patro instruis sian filon ideografion. Li skribis per plumo la vorton "1" sur papero. La filo tuj ĝin memoris.

La sekvantan tagon, ĵus post matenmanĝo, la patro ankoraŭfoje skribis la vorton "1", sed ĉifoje sur la tablo per sia fingro kun akvo. La filo jam ne konis tiun vorton. La patro diris, "Ĉu ĉi tio

ne estas la sama vorto "1", kiun mi instruis al vi hieraŭ? Kial vi ne plu rekonas ĝin?"

La filo estis mirigita. Li diris, "Kiel mi scias, ke ĝi kreskis tiel granda post nur unu nokto!"

El "Hiaŭfu"

Plej Sekura Gardado

Iu, plantis multajn salikojn kaj dungis knabon por ilin gardi ke oni ne ilin eltiru. Post dekkelkaj

tagoj, li trovis, ke neniu saliko estis perdita. Li diris al la knabo, "Vi tre bone gardis la salikojn. Kiel vi ilin gardis?"

La knabo tre ĝojis pro la laŭdo kaj eldiris sian sekreton: "Mi diras al vi, sinjoro, por ke oni ne eltiru la salikojn en la nokto, mi elradikigis ilin ĉiunokte kaj konservis en mia domo. La sekvantan matenon, mi denove plantis ilin en la teron. Tiu estas metodo tre sekura!"

El "Hiaŭfu"

La Muzeo de Lusin en Pekino

Antaŭposteno de la Proleta Revolucia Literaturo

En hela vitrizita kadro estas montrata kovrilo de la periodaĵo *Antaŭposteno*, la organo de Ligo de Ĉinaj Maldekstremaj Verkistoj. Ĝia ruĝe presita titolo estas manskribo de Lusin. Tiu ĉi kovrilo estas de la "speciala numero por memorigo al la martiroj", subtere redaktita kaj eldonita de Lusin kaj aliaj revoluciuloj riskantaj sian vivon en Ŝanhajo, 1931, por akuzi la sekretan murdon faritan de la kuomintang-a reaktiularo al Ĵouŝi kaj aliaj 4 revoluciaj verkistoj.

Post la martiriĝo de Ĵouŝi kaj la aliaj, la aktivado de L.Ĉ.M.V. ne povis ne iri pli kaŝe. Tiam la reaktiularo de Kuomintang ne permesis al la gazetoj publikigi ian ajn informon pri la okazintaĵo kaj la situacio estis tre streĉa. La reaktiaj gazetoj eĉ disvastigis la famon, ke Lusin jam estas arestita. Sed Lusin brave staris ĉe la plej antaŭa vico en la batalo kaj mem partoprenis la tutan proceson de la redaktado kaj presigo de la speciala numero.

Pli poste Lusin ankaŭ verkis laŭpete la eseon *La Nuna Stato de la Literaturaj Rondoĵoj en la Malluma Ĉinio* kiu estis sendita kaj publikigita en la progresema gazeto de Usono *Nova Amaso* por malkovri la sangan murdon kaj akiris vastajn simpatiajn respondojn kaj subtenon.

Klasa Amikeco en Batalado

En la muzeo estas ekspoziciataj la Verkaro de Kju Kiubaj kaj la Kompleta Verkaro de Lusin, en kiuj ambaŭ troviĝis la sama eseo *Babilado pri la Versaĵo de la Justa Regado*. Tiu ĉi eseo, senmaskiganta la malbelan vizaĝon de Hu Ŝi, estis kune verkita de k-do Kju Kiubaj kaj Lusin, redaktita de k-do Kju Kiubaj kaj publikigita sub la pseŭdonimo de Lusin. Ĝi estis unu el la pli ol dek batalaj eseoj kune verkitaj tiutempe de ili.

Depost la jaro 1931, en la ŝultro-ĉe-ŝultro batalado naskiĝis intima amikeco inter Lusin kaj k-do Kju Kiubaj. Tri fojojn Lusin ŝirmis k-don Kju Kiubaj per sia loĝejo en Ŝanhajo. Ili ofte intime interparoladis en nokto pri la fundamenta strategio de batalado kaj pri kulturaj problemoj. La pli ol dek eseoj kune verkitaj de ili kaj severe riproĉantaj la imperiistojn, perfidulojn kaj nacivendantojn, estis ĉiuj redaktitaj de k-do Kju Kiubaj kaj publikigitaj sub la pseŭdonimo de Lusin. La fotografiaĵoj pri kelkaj el tiuj eseoj estas nun montrataj en la ekspoziciejo de la muzeo kiel atesto de la amikeco en batalado inter la du revoluciuloj. Tie troviĝas ankaŭ la versparo:*

Sufiĉas en la vivo havi unu koramikon.

Rigardu ni la mondon kiel samaideanoj.



Lusin kaj Kju Kiubaj.

Skizo de Hju Bejhong

kiun Lusin verkis por esprimi sian amikecon al k-do Kju Kiubaj kaj sian koran amon al la Komunista Partio de Ĉinio.

Lusin kaj la Junularo

Estas konate, ke dum sia mezaĝa periodo Lusin fervore laboris, por eduki la junan generacion, en Pekina Universitato, la Virina Pedagogia Universitato de Pekino k.c.. Efektive la junularo, kiun Lusin tiam kontaktis, estis multe pli vasta ol kiel konata de la ĝenerala publiko. En la Muzeo de Lusin estas montrita statistiko farita laŭ la taglibro de Lusin, pri lia instruado en 8 kolegioj kaj universitatoj en Pekino, kiu atestas pri la tagnokta laborado de tiu ĉi pioniro de la revolucia kulturo por eduki la duan generacion.

* *Versparo estas paro de versoj maksimumaj aŭ lirikaj, kiujn oni ordinare skribas sur paperrubandoj por ornami ĉambbron, pardon k.s. en Ĉinio.*



Lusin babilas kun junaj lignogravuristoj (1936).

Laŭ la statistiko, ekde 1920 ĝis 1926, Lusin verkis entute pli ol dek novelojn, tradukis ĉ. dek verkojn, kaj verkis *Skizon pri la Historio de Ĉinaj Noveloj* kaj multajn eseojn, kiuj estas tre elstaraj verkoj kaj havis grandan influon en kaj ekster la lando. Kun tiel multaj kaj pezaj laboroj li ankoraŭ kuradis de unu al alia universitato por lekiadi.

Dum tiu periodo, tage Lusin donis lecionojn en universitatoj, vespere akceptis vizitantojn, kaj ofte nur post la noktomezo li povis sin okupi pri verkado. Kaj kiam li laciĝis, li ofte dormis kunveste kelkajn horojn kaj poste denove daŭrigis la skribadon. Li ofte sin okupis je korektado de manuskriptoj de junaj verkistoj, eĉ pri korektado de presprovajoj, kaj ĉion li faris tute konsciencie. En la muzeo troviĝas manuskriptoj atenteme korektitaj de Lusin por junaj verkistoj, kaj la instrumentoj, kiujn li uzis por desegni kovrilojn por libroj kaj gazetoj de junaj verkistoj, ĉio ĉi tio estas pruvo de la sang-ŝvita laborado de Lusin por la juna generaio.

La "Huovuĉang"* kaj Aliaj

En la muzeo estas por la unua fojo ekspoziciata la originala desegnaĵo de la figuro de "Huovuĉang", kiun Lusin faris propramane. Ĝin oni jam vidis kiel ilustraĵon en la libro *Matenaj Floroj Kolektitaj Vespere*, sed vidinte la originalon oni sentas ĝin pli intima. Tiel fluaj estas la strekoj, kaj tiel viveca estas la bildo, ke sen klarigo estas vere malfacile kredi ke ĝi estas el mano de verkisto.

Estas ekspoziciataj ankaŭ bildoj de kornbestoj, argilaj idoloj kaj antikvaj statuoj de virinoj propramane desegnitaj de Lusin kaj la de li kolektitaj batpresaj** folioj de diversperiodaj gravuraĵoj de homfiguroj, ksilografiaj ilustraĵoj el Ming-dinastio, koloraj porĉo-diaj ikonoj, papertranĉaĵoj k.a. La bildoj

* *Huovuĉang* estas sendito de la Reĝo de Infero laŭ ĉina popola legendo por kapti la animon de ĵusmortinto al la subtera mondo.

** *Batpresado* estas aplikata por reprodukti figuron aŭ skribon gravuritan sur ŝtono aŭ metala objekto.

En la Muzeo de Lusin en Pekino.



pri la antikvaj statuoj de virinoj estis desegnitaj nur per malmultaj strekoj, sed vivecaj estas iliaj trajtoj—tio bone montras al ni la maturan artnivelon de la pentrinto. Post rigardado la pentristoj kiuj vidis la desegnaĵojn unuvoĉe laŭdis la vivtransdonan penikon de Lusin.

Ma Ĉuanŝeng

*Ŝi Motormelodion
Eksatas, Aŭskultadas*

*En montvilaĝo vivas knabin' de-infanaĝe,
kaj trilojn de l' birdaro aŭdadi ege ŝatas.
De kiam la fabrikoj stariĝis montvilaĝe,
ŝi motor-melodion eksatas, aŭskultadas.
Ŝi tage kaj en nokto ĝin ĝuas kvazaŭ frando,
kaj la motormuzikon ornamas per trilkanto.*



“Interrompita Am-songô”

— Elstara Opera Artfilmo —

“**I**NTERROMPITA Am-songô” estas la lasta opera artfilmo, kiun protagoniste ludis K-do Mej Lanfang. Ĝi estis scenarigita surbaze de unu akto el la fama dramverko “La Peonia Pavilono” de Tang Hianzu (1550-1617), la granda ĉina dramverkisto el Ming-dinastio. Ĝi estas ankaŭ peco el la elstaraj tradiciaj operoj de *kunĉju*. La filmo ĉefe priskribis la aspiron al amo kaj libero de junulino Du Liniang katenita de la malnova feŭdisma moralo.

Du Liniang, la filino de Du Baŭ prefekto de Nan-an, estis juna kaj bela, sed la feŭdisma moralo devigis ŝin kontraŭvole sin enfermadi tutajn jarojn en la buduaro. Amsopiro ŝin turmentadis, sed la amo estis por ŝi afero nur por revado.

Iun printempan tagon, ŝi iris promeni en la ĝardenon kune kun

sia serv-knabino Ĉunhiang. En la ĝardeno arde kantis birdoj kaj ebriige aromis floroj, kio tamen ŝin des pli ĉagrenis. Laciĝinte de promenado ŝi revenis ripozi en sia ĉambro. Ŝiaj pensoj malklariĝis kaj ŝi falis en sonĝon, en kiu ŝi renkontis en la ĝardeno idealan junulon, intelektulo Liu Mengmej. Je la unua vido ili jam enamiĝis reciproke kaj alvenis la feinoj de floroj por ilin interligi kiel amprotektantoj. Ĝuste kiam Liu adiaŭis al Du Liniang kaj Du Liniang sekvis la malproksimiĝantan amaton per siaj okuloj kun superrega amemo, alvenis ŝia patrino kaj vekis ŝin. La patrino rimarkis ĉe la filino animstaton de intensa sopiro kaj do admonis ŝin ne ofte promenadi en la ĝardeno. Kvankam Du Liniang jesis buŝe, tamen en la koro ŝi daŭre rememoris la interrompitan sonĝon.

Kvankam la intrigo de la scenaro de tiu ĉi filmo estas tre

simpla, sed je la apero de la feinoj de floroj prezentiĝis multaj tre belaj scenoj de dancado kun ĝuiga muzika akompano, ke la spektantoj nature venas al la konkludo, ke la filmo estas enkorpiĝo de la belo mem.

En tiu ĉi filmo oni povas plene vidi la krean genion kaj la maturiĝintan arton de K-do Mej Lanfang.

1. *Du Liniang bedaŭras la rapidan forpason de sia juneco en la buduaro.*
2. *Ĉunhiang raportas al Liniang, ke ŝi jam ordonis al parkservisto purigi la parkon.*
3. *Liniang kaj Ĉunhiang admiras la belecon antaŭ peonioj.*
4. *Allogite de la parka pejzaĝo, Liniang ne volas foriri.*
5. *La patrino vekis Liniang el sonĝo.*
6. *Ili renkontas en sonĝo.*



Rakontoj pri Afanti

— Ujguraj popolaj rakontoj —

Kokovendo

Iun tagon, Afanti portis al foiro la grandan kokon, kiun li mem bredis, kaj ĝin forvendis. Kiam li kalkulis la ricevitajn monon, iu ĝemante diris:

“Ve, Afanti! Vi forvendis vian kokinon kvazaŭ por nenio; laŭ sia vosto ĝi ja povas meti tri ovojn ĉiutage.”

Enmetinte la monon en sian poŝon, Afanti respondis:

“Kara amiko, se vi jam vidis la voston de la koko, bonvolu vidi ankaŭ la kapon. Se mi ne havas malsanajn okulojn, nek estas freneza, mi kredas ke mi certe ne faris eraron forvendante mian virkokon povantan meti tri ovojn ĉiutage.”

Ĉevalorajdo

Afanti estis invitita gastigi ĉe sia intima amiko. Post festeno li rajdis hejmen sidante dors-al-fronte sur la ĉevalo.



La ĉevalo portis Afanti al la hejmo kaj haltis antaŭ la pordo. Ĉe vido de tio lia edzino, povante nek plori, nek ridi, kriis laŭte:



Mej Lanfang ludis Du Linjang en sia junaĝo.

7. Ili atingis la belan celon per helpo de feinoj de floroj.



“Honto, Honto, Afanti! Kion vi faras! Ĉu vi ne scias honti? Ĉu vi ne hontas tiel rajdi? Pro kio vi sidas sur la ĉevalo en inversa direkto?”

“Kiu diras ke mi sidas sur la ĉevalo en inversa direkto?” diris Afanti. “Fakto estis: kiam mi surĉevaliĝis, ĝi mem staris en inversa direkto.”

Glavo kaj Fajrostango

Afanti vagadis en foiro, jen li vidis subite iun alvenanta kun glavo en sia mano.

“Kiom kostas ĉi-tiu glavo?” Afanti demandis.

“Dek arĝentajn ingotetojn,” la homo respondis.

“Tro multe! tro multe!”

“Jes, la prezo estas alta, sed mia glavo havas unikan kvaliton: Kiam vi pikas lupon per ĝi, ĝi mem etendiĝos antaŭen je cent futoj.”

Palpante sian frunton Afanti diris: “Mem etendiĝi antaŭen je cent futoj, tio ne estas tiom mirinda. Kiam mia edzino ek-koleras, kaj batas min per fajrostango, ĝi povas etendiĝi antaŭen per si mem je ducent futoj por atingi mian kapon.”

Ĉasisto

Iu ĉasisto demandis al Afanti: “Mi ĉasis jam de multaj jaroj, Afanti, sed mi ankoraŭ ne komprenas, pro kio la ĉasistoj fermas unu okulon kaj malfermas la alian, kiam ili celas kaj pafas per sia pafilo.”

“Ankaŭ vi devas agi same, malfermante unu kaj fermante la alian,” diris Afanti. “Se vi fermus ambaŭ viajn okulojn, vi povus nenion vidi.”

Ĝong Kuj en la Ĉinaj Pentraĵoj

La fantomkaptisto Ĝong Kuj estas popolfabela heroo sufiĉe populara en Ĉinio, kaj lia figuro ankaŭ estas tre populara en la ĉina pentrarto. Kaj la portreto sur la kovrilo de nia lastatempe eldonita libreto Rakontoj pri Fantom-spitantoj estas ĝuste tiu de Ĝong Kuj. La suban artikolon ni speciale prezentas al niaj legantoj por koni la figuradon de Ĝong Kuj fare de ĉinaj pentristoj de la pasintaj generacioj. —La Red.

ĈIUFOJE, kiam alvenas Duan-jang-festo (la kvina tago de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro), al nia memoro nature sin prezentas la stranga interesa figuro de Ĝong Kuj, kun

ĉapo el nigra gazo surkape, kun robo surkorpe, kun spado enmane, kun korteganaj botoj surpiede kaj hirta barbo sur la mentono kaj vangoj. En tiu ĉi festo-tago, ofte estas ludata en teatroj la

opero "Fratinedzinigo de Ĝong Kuj" kaj endome oni kutimas pendigi bildon pri "Ĝong Kuj Manĝanta Fantomojn". Pro kio la homoj havas tradician simpatian al li? Oni diras, ke li kaptas

Farado de Fajro

Iun tagon, kiam la edzino ne estis hejme, Afanti volis mem prepari teon por si. Sed malgraŭ ekbruligoj kaj blovado, li ne sukcesis fari fajron. Nenion plu povante fari, li eniris en la ĉambbron kaj revenis en la vesto de sia edzino—sed jen fajro jam ekbrulis.

"He! ci daŭre ne ekbrulu por mi!" Afanti diris, "ci do timas mian edzinon!"



Aleksandr Logvin:

Plej Sinceraj la Versetoj pri la Verdaj Revuetoj. . .

*Jen sur mia skribotablo—
alsenditaj kun afablo
la revuoj esperantaj,
dezirindaj, diverslandaj. . . .*

*Sin eligas en la vico
blanka revuet' el Nico,
atingebla ne por ĉiuj—
nur por elektitoj iuj,—
eburtur' de l' eŭropanoj,
superuloj—mondlingvanoj. . . .
Tamen estas ĝi bonstila,
altnivela, pura, brila—
jen parnasa leĝdonanto
por poeto kaj leganto!*

*"Norda Prismo"—neĝa floro!
la revuo verdkolora—
rava, reva, vivovola,
plene esperantpopola,
estas ĝi evoluema
kreoforta, libertema,
ĉiam—kora, ĉie—nia,
hejma kaj internacia!*

*Al "Nuntempa Bulgario"
el animo iras krio:
—Vin plenfloris kaj ĝojfestas,
ja pri tio l' Mond' atestas!
Belaj rozoj, vinberaro,*

*fajnlegomoj, Nigra maro. . . .
Sonaj versoj, bona prozo—
ĉio varme bulgaroza!*

*Same estas vivparola
de Ĉini' revu' popola—
bildoriĉa, meditsaĝa,
interesa ĉiupaĝe!*

*La "Kooperativismo"
estas varme optimisma.
Ĝoje diras ni pri tio
al revu' de ĉarma Rio!*

*Tre alloga por la homo—
la revu' de l' kulturdomo,
de l' kastel' esperantista. . . .
Ho, se estus mi turisto?!
Venus tiam mi Francion,
por kortuŝe, kun pasio,
frate premi viajn manojn,
diverslandaj verdstelanoj!*

*Estu verdaj revuetoj
Kaj ĵurnaloj kaj gazetoj
ĉiam plue progresemaj,
bondeziraj kaj pacemaj!
Estu ili lumofonto
por la lingvo de l' Estonto!*

Moskvo, aprilo 1961.

fantomojn, forigante por la homoj malbonojn kaj malfeliĉojn, tiel ke ili vivu sane kaj sekure. Ĉi tiu interesa legendaĵo profunde penetranta inter la popolanojn, jam havas historion de pli ol mil jaroj. Jen ĝia deveno.

Minghuang, la sesa imperiestro en la jaroj 712-756 p.K. de Tang-dinastio, trafis foje pezan malsanon, kaj unu tagon li subite vidis en sonĝo grandan fantomon, kun eluzita ĉapo, blua robo, larĝa zono kaj korteganaj botoj. Kaptinte kelke da malicaj fantomoj li ŝovis ilin en la buŝon kaj ekmaĉis kaj maĉadis. La granda fantomo diris ke li estis kandidato el la Montaro Ĝongnan kaj sin mortigis per kapofrapo kontraŭ la ŝtuparo en la kortego pro malsukceso en la imperia ekzameno. Surprizite, Minghuang vekigis, kaj subite forigis ankaŭ la malsano. Pro tio la imperiestro alvokis la kortegan pentriston Vu Daŭzi, kaj priskribis al li pri la figuro de la granda fantomo, kiun la imperiestro vidis en la sonĝo, por ke li por tiu ĝin laŭ lia priskribo. Sekve de tio, la figuro de Ĝong Kuj, kiu formanĝas malicajn fantomojn kaj gardas la pacon kaj sekurecon de la homoj, vaste diskonigis, kaj penetris profunde inter la popolanojn, ke ili kutime algluas la portreton de Ĝong Kuj sur la pordofolion. Sed antaŭe tion oni faris honore al li la unuan tagon de la jaro kaj ne la kvinan de la kvina monato. El esplorado de antikvaj pentraĵoj montriĝas, ke la ŝanĝiĝo de la festa dato eble okazis post la regado (1662-1722 p.K.) de la imperiestro Kang Hi en King-dinastio.

Parolante pri la portretado de Ĝong Kuj, nature oni ekpensas pri diversspecaj kaj interesaj pentraĵoj el la manoj de majstroj de pasintaj generacioj. Krom la kutimaj figuroj pri fantomkaptado, fantommanĝado ktp., ni povas ankaŭ vidi alitemajn bildojn, en kiuj Ĝong Kuj rigardas al "ĝojiga araneo" pen-

danta en aero por aludi pri vido de ĝojiga afero; aŭ "frapas" (ĉine: *gi*) "King"-on (frap-muzikilo) por simboli "Feliĉon" (ĉine: *giking*); aŭ unu aŭ kvin vespertoj (ĉine: *biansfu*) flugas super Ĝong Kuj por signi benon (ĉine: *fu*) el la ĉielo. Krom tiuj troviĝas ankaŭ pentraĵoj pri "Ebria Ĝong Kuj", "Dormanta Ĝong Kuj", "Ekskurso en Ĝongŝan" (laŭ la legendo li loĝis en tiu loko), "Fra-



Fingre pentrita de Gaŭ Kipej (1672-1734 p.K.).

tinedzinigo de Ĝong Kuj" kaj aliaj. Krom la plej frua eminenta portretisto el Tang-dinastio Vu Daŭzi, en la sekvintaj generacioj estis dek kelkaj aliaj konataj pentristoj famaj kiel majstraj desegnantoj de Ĝong Kuj, kaj grandparte de iliaj originalaj verkoj konserviĝis ĝis nun.

Jen ni prezentu du portretojn de Ĝong Kuj kun malsamaj mienoj. Unu el ili estas pentrita



Pentrita de Ĵen Bonian (1840-1896 p.K.).

de Gaŭ Kipej per fingro el la dek-oka jarcento. En tiu pentraĵo Ĝong Kuj staras sola, tenante la manojn reciproke en la manikoj, kaj lia mieno montriĝas majesta kaj paca, iom simila al tiu en la opero "Fratinedzinigo", en kiu li estas en gaja humoro, kun aspekto plaĉa sed ne timiga.

La dua estas desegnita de Ĵen Bonian, majstro el la dek-naŭa jarcento. En ĝi Ĝong Kuj tenas spadon en la dekstra mano kaj ĝin kaŝas per la maldekstra mano, lia kapo kliniĝas iomete maldekstren kaj la okuloj estas direktitaj oblikve al la dekstra flanko. Estas klare videble, ke Ĝong Kuj jam rimarkis iajn malicajn fantomojn kaj, estas preta ŝteliri por kapti ilin, kiuj ne estas montritaj en la pentraĵo, sed la okulesprimo de Ĝong Kuj jam montras al ni, kie estas la fantomoj. Ĵen Bonian lertis en uzado de la metodo "lasi ion por la imago de la rigardantoj".

La Sportoj Ŝatataj de la Mongola Popolo

Rajdarto kaj Arkopafo

RAJDARTO kaj arkopafo estas arde ŝatataj sportoj de la mongola popolo. Okaze de festtagoj, ferioj, edziĝaj k.a. celebradoj kaj en vilaĝaj firoj aŭ templo-kunvenoj, ofte okazas konkuro de ĉevalrajdado kaj arkopafado. Inter la mongolaj popoloj ne malmultaj homoj komencas lerni ĉevalrajdon de la sepjara aĝo, kaj kiam ili estas dekelkjaraj, ili jam fariĝis bonaj rajdistoj. Oni diras, ke mongolaj knaboj jam estas instruataj pri rajdado helpe de plenaĝuloj kun la du kruroj en la tolaj sakoj ambaŭflanke de la selo kaj firme alfiksigite per ŝnuro supre kaj malsupre. Oni ekzercas ilin kondukante la ĉevalon per rimeno. Kiam ili estas dekelkjaraj, ili jam bone scipovas bridi, galopigi kaj trotigi la ĉevalon, kaj ankaŭ fari diversajn akrobataĵojn. Knaboj pli lertaj povas ankaŭ rajdi tute sentime senselan ĉevalon rapide galopantan. En la tutlanda sporta kunveno en 1959, deksep-jara mongola sportistino Ĉjensajma kreis novan tutlandan rekordon de 1,000 kaj 2,000 metroj de virina ĉevalkurado kaj gajnis la ĉampionecon. En 1960, dektri-jara junpionira rajdistino Dugima eĉ rompis ŝian rekordon per pli altaj rapideco kaj rajdarto.


La artoj de ĉeval-rajdo kaj arkopafado de la mongoloj havas multajn formojn. En rajdarto, krom la longdistanca rajdkonkurso, oni povas distingi surĉevalan pilkludon, rajdkonkurson kun barajoj, kaj konkurson pri speciala rajdarto, kampan rajdkonkurson, k.t.p. La ludarto de "ordos"-glavo propra al la mongoloj estas eĉ pli admirinda pro la lertegaj kaj viglegaj batoj, kaj estas bonvenigata de ĉiuj. La

mongola vorto "ordos" signifas stepon. Dum ludo de tiu ĉi rajdarto, oni rajdas sur ĉevalo rapide galopanta sur stepo, kaj preterpasante dishakas definitan objekton per akra glavo.


En arkopafado oni povas distingi pafadojn dum kurado, en pozicio staranta, kaj kuŝanta, sed la plej interesa kaj nacikolora estas la arkopafado sur galopanta ĉevalo, al celajo pendanta sur alta stango dekojn da futoj malproksime. La pafarkistoj alrajdantaj sur galopantaj ĉevaloj, pafas kaj ĝin trafas ekzakte. Kelkaj rajdistoj eĉ povas pafi kelkajn sagojn en sinsekvo sen maltrafo kaj tiun arton oni nomas "pafotrio el la sama ĉevalo".

Luktarto de Mongola Stilo

Kvankam la fundamentaj manieroj de la mongolstila luktado konsistas nur el la movoj de altiro, treno, malhelpo kaj stumbligo per piedo, sed la arto estas sufiĉe komplika. El la dek tri fundamentaj movoj tamen povas formiĝi centoj da variaĵoj. Laŭ la regularo de la internacia luktarto ne estas permesate kapti la veston de la kontraŭulo, nek lin ĉirkaŭbraki malsupre de la talio, nek lin faligi per helpo de la kruro, kaj la malvenko estas decidita nur per la tuŝo de ambaŭ ŝultroj sur la tero, sed ne de iu ajn alia parto de la korpo. En la lukto mongolstila, la tuta korpo povas partopreni en la luktado. Oni povas kapti la vestkolumon kaj zonan, ankaŭ povas ĉirkaŭbraki la talion kaj kruron, kaj en la pasinteco oni eĉ povis levi la rivalon. Laŭ la regularo de la mongolstila luktarto, la ektuŝo de la tero de iu ajn korp parto escepte de la piedoj estas kalkulata kiel malvenko. La mongoloj nomas la luktiston "buĥ". Estas interese ke la "buĥoj" portas "godog"-on — t.e. luktovesto kun-



Surĉevala pilkludo en Huhehot, la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.



kudrita el pluraj tavoloj da kanvaso, dekoratan per brilantaj latunaj grandkapaj nitoj; malsupre li portas larĝan buntan pantalonon kun multaj faldoj; liaj piedoj portas ledajn botojn. Kiam la lukto komenciĝas, luktistoj unue sin klinas, etendas siajn brakojn, faras diversajn dancmovojn kaj kantas altvoĉan popolan kanton, por esprimi respekton unu al la alia kaj al la spektantoj.

La mongola luktarto disvastiĝis en vera senco nur post la Liberiĝo. En la Tutlanda Kunveno de Nacistilaj Sportoj en 1953, ĝi jam enlistiĝis en la programo. Kaj poste ĝi ricevis pluan ordigon: ĝiaj maltaŭgaj reguloj kaj kutimoj estas forigitaj, la luktistoj estis prove klasigitaj, la kostumo kiu facile vundas la konkursantojn, estas reformita kaj la fundamentaj tekniko kaj taktiko, plibonigitaj. Tiel kun la karakterizaĵoj de la tradicia formo bone disvolvita kaj la avantaĝoj de la tutlanda luktarto bone adoptitaj, ĝi fariĝas pli utila al la popolo, en korpokulturo kaj sekve de tio ĝi ankaŭ multe pli disvastiĝis.

Pulu-ĵetado

Pulu-ĵetado estas propra sporto de la mongola popolo. "Pulu" estas objekto farita el ligno L-forma, kovrita per plumba, latuna aŭ fera lado. Ĝiaj formo kaj pezo diferencas laŭ la maniero de uzo, ĝenerale ĝi havas du specojn t.e. plata kaj ronda. Ili pezas 300 ĝis 500 gramojn.

Kiam ĝi estas elĵetita, ĝi turniĝas en la aero tre rapide kaj firme pro ĝia L-formo. Oni povas ĵeti ĝin por mortigi birdon en la aero kaj bestojn sur la tero, precipe malgrandajn bestojn, kun pli granda efiko kontraŭ leporoj, flavaj ŝafoj, vulpoj, lupoj, fazanoj k. a. birdoj. Ja ĝi estas laŭga kaj malpeza armilo por ĉasi.

Pulu-ĵetado estas populara inter la mongolaj popolanoj, laŭdire jam de mil jaroj, ĉar ĝi estas kaj bona ĉasmaniero kaj tre bona sporto, ĝin ŝatas ĉiuj junuloj kaj maljunuloj, viroj kaj virinoj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Prelegado de Diversaj Skoloj de Ĉina Medicino

En la lastaj cent jaroj, aperis en Ŝanhajo multaj eminentaj kuracistoj kaj diversaj skoloj de la ĉina medicino, kiuj havas apartajn opiniojn kaj riĉajn spertojn en sciencaj studoj kaj klinikaj laboroj. Ekde junio, la Medicina Kolegio de Ŝanhajo trifoje invitis eminentulojn de la ĉina medicino al prelegaj kunvenoj por ke iliaj spertoj estu inter-

ŝanĝataj kaj disvolviĝu diskutado pri iliaj diferencaj opinioj.

Vortordiga Sistemo de Ĉinaj Ideografiaĵoj

La manko de unika kaj facile uzebla sistemo de vortordigo de la ĉinaj ideografiaĵoj tre malfaciligas la konsultadon de la vortaroj kaj indeksoj. Antaŭ nelonge, la reprezentantoj de la Kultura kaj Eduka Ministerioj, la Ĉina Scienca Akademio, la Lingvistika Instituto, la Komitato por

Reformo de la Ĉina Skriba Lingvo kaj eldonaj institucioj kunsidis dufoje por diskuti pri ordigado kaj unuigo de la vortordigaj manieroj. Oni decidis organizi kvar esplorajn grupojn por pristudi la 400-500 projektojn de vortordiga maniero nun sinproponantajn laŭ malsamaj principoj, nome: laŭ tiuj de fonetiko, fundamentaj signoj, numerigo kaj strekformoj, kaj plua diskuto kaj eksperimentado estos farataj post kiam la dirlitaj grupoj prezentos raporton en la kuranta jaro.

DUGIANG-BARAJO

Akvoutiliga Konstruo antaŭ 2200 Jaroj

SIĈUAN-PROVINCO de sudokcidenta Ĉinio estas delonge konata kiel lando de fekundeco, kaj ĝia koro estas la Okcident-siĉuana Ebena, kie sin trovas ĝia ĉefurbo Ĉengdu.

La ebena de la okcidenta Siĉuan estis regiono abunda ne ekde pratempo. Ĝi situas ĝuste ĉe la meza parto de Minrivero, unu el la kvar grandaj riveroj de la provinco. Supre de la rivero la montoj estas krutaj, la valo mallarĝa, kaj la fluo, torenta kaj rapida. Kiam ĝi atingas la Ebenon la fluo subite malrapidiĝas kaj la ŝlimo kaj la ovalaj ŝtonetoj de ĝi kunportataj pli kaj pli obstrukcis la riverliton. Tial ofte okazis inundo en la sezono de neĝdegelo aŭ pluvado, kaj trosekeco post kiam sekiĝis la riverlito. Krome, tuj oriente de la rivero staras Julej-montaro, tial okazis preskaŭ ĉiujare inundo okcidente de la rivero kaj trosekeco ĉe la alia flanko.

Tiu stato radikale ŝanĝiĝis nur post finkonstruo de Dugiang-baraĵo, la granda akvoutiliga konstruo ĉe la meza parto de Min-rivero en Guan-gubernio, ĉ. 250 a.k., sub gvido de Li Bing, la tiea prefekto de Kin-regno kaj lia filo Erlang.

La ampleksa antikva konstruo akvoutiliga kaj irigacia Dugiang-baraĵo konsistas el tri malsamspecaj konstruaĵoj, nome: fluodivida, akvokonduka kaj

-defluiga. Dugiang-baraĵo mem kiel la ĉefa konstruo de fluodivido staras en la mezo de la rivero dividante Min-riveron en du partojn: la Interna kaj la Ekstera. La Interna Rivero estas kondukita al kampoj por irigacio, dume la Ekstera Rivero servas por defluigo de la akvego. La ĉefa konstruo de akvokonduko estas montbreĉo elhakita ĉe la orienta bordo de Min-rivero. Ĝi estas nomata Baŭpingkoŭ, tra kiu fluas la akvo de la Interna Rivero al grenkampoj. Kontraŭ tiu montbreĉo en la meza parto de Dugiang-baraĵo estas alfaritaj ankaŭ konstruaĵoj por defluigo kaj nivellevado de la akvo por reguligi la fluokvanton kaj malpliigi la amasiĝon de ŝlimo kaj sablo. Dank' al tiuj konstruoj pli ol 210,000 hektaroj da agroj estis irigaciaj kaj la vasta ebena fariĝis fekunda regiono.

Konstruado de tia granda akvoutiliga konstruo estas malfacila eĉ en la nuna tempo. Tial estas tute imageble kiajn malfacilegojn oni alfrontis antaŭ 2200 jaroj, kiam en Ĉinio troviĝis nek fortikaj konstruaj materialoj kia ferbetono, nek ekzaktaj mezurinstrumentoj kaj nek ia ajn maŝinoj aŭ bonaj iloj porkonstruaj, kvankam tiam feraj instrumentoj estis jam vaste uzataj. Sed Li Bing kaj lia filo kune kun la popolamaso konkeris tiujn malfacilegojn. Ili eltrovis




Dugiang-baraĵo.

*Ĉinstila pen-
traĵo de Cen
Hjuegong.*

rimedojn por monthakado, nome per bruligo al kanalizitaj rokoj ke la ŝtonegoj kreviĝu kaj fariĝu pli facile hakeblaj. Ili elpensis efikan rimedon por barajokonstruado meze en la torenta rivero per grandaj bambuaj korboj plenigitaj per ovalaj ŝtonetoj. Nur dank' al tio la granda Dugiang-barajo estis fine konstruita. Ĉiuj tiuj eltrovoj karakteriziĝas per facila akirebleco de materialoj, facileco en la laboro kaj fidinda solideco de la konstruaĵo kiu alportis feliĉon por ĉiam al tiea loĝantaro. Tial la legendo pri la batalo de Li Bing kontraŭ la River-dio eĉ nun estas vaste rakontata en Siĉuan-provincio kaj la Tempo de Du Sanktuloj por kulti al Li Bing kaj lia filo ĝis nun ankoraŭ staras sur la orienta bordo de Dugiang-barajo.

En pli ol 2000 jaroj, ia akvoutiligaj teknikistoj kaj laboruloj de okcidenta Siĉuan-provincio kreis kaj disvolvis surbaze de tiu granda akvoutiliga konstruo, kompletan sistemon de akvomastumado, fluobridado kaj barajo-riparado konforman al sciencaj principoj. Ili trovis laŭ spertoj konvenan akvonivelon de la rivero, starigis mezurilon de akvonivelo, sondis kaj fiksis profundecon de la riverlito bezonatan de la fluokvanto kaj instalas en la riverlito t.n. "kuŝantan feron" kiel signon de la profundeco nepre atingenda en la dragado. La plej admirinda kreaĵo de saĝeco de la laboruloj estis la moveblaj *maĉa-oj*, per kiuj oni formas barajon uzeblan en fluobarado, akvodivido, dig- kaj bord-protekto. Strukturo de *maĉao* estas tre simpla: Ĝi estas formita el kunligitaj dikaj traboj en la formo de stativo, ĝiaj piedoj estas firmigitaj per bambuaj korboj plenigitaj per ovalaj ŝtonetoj, kaj ekstere ĝi estas ŝirmita per bambua plektaĵo, kiu estas ŝmirita per argilo. Per vico da maĉaoj oni povas formi provizoran barajon por fluohaltigo; en defluigo oni povas laŭbezone fortiri kelkajn el ili kaj por akvo-



dividi oni povas utiligi ĝian deklivan surfacon por moderigi la impetan forton de la torento kaj krome

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Rememorigo pri Lusin

Lusin estas la fondinto de la ĉina moderna literaturo kaj granda revoluciulo kaj pensulo. Okaze de la 80-a datreveno de lia naskiĝo kaj la 25-a datreveno de lia forpaso, ĉinaj artistaj kaj literaturistaj rondoj faris diversajn rememorigajn agadojn pri li.

En eldonado de la verkoj de Lusin, krom *Leteroj de Lusin* kaj la du dekvolumaj *Kompleta Verkaro de Lusin* kaj *Kolekto de Tradukaĵoj de Lusin*, kiuj jam aperis antaŭ longe, aperis en tiu ĉi jaro *Manuskriptoj de Lusin* kaj *Poemo-manuskriptoj de Lusin* faksimile presitaj. *Ŝanhaja Literaturo* kaj multaj aliaj literaturaj

periodaĵoj eldonis specialajn numerojn memore al sinjoro Lusin kaj aperigis en ili memorigajn kaj studajn artikolojn pri li kaj krome ankaŭ iujn el liaj verkoj antaŭe ne publikigitaj. Nun ankaŭ la Ĉina Esperanto-Ligo planas eldoni Novelaron de Lusin, en esperanta vesto, kiu enhavos la plejparton de liaj noveloj.

La muzeoj kaj memorigaj institucioj de Lusin en Pekino, Ŝanhajo, Kantonco, Amoj, Ŝaŭhing k.a. rearanĝis kaj pliriĉigis siajn ekspoziciaĵojn kaj denove malfermiĝis al la publiko ĉirkaŭ la memoriga tago. La tombejo de Lusin en Ŝanhajo estis riparita kaj malfermita al libera vizitado.


La surskribadoj de kamarado Maŭ Zedong sur lia tomboŝtono estis denove orumita kaj lia malnova blankcementsa statuoj estas anstataŭigita per nove muldita bronza statuoj 1262 kilogramojn peza.

Krom aranĝo de memorigaj kunvenoj, oni ankaŭ prezentis teatraĵojn kaj filmojn por memorigi lin, inter kiuj troviĝis krom la antaŭe farita filmo *Benpeta Ofero* adaptita laŭ lia samtitola novelo, ankaŭ la ĵus farita *Vivo de Lusin*, kaj en Ŝanhajo, oni prezentis humuran teatraĵon laŭ lia novelo *la Vera Historio de Ah Q* kaj la novan teatraĵon *Fragmentoj de Lusin-aj Verkoj*.

per diversa denseco de la aranĝo de maĉa-barajo, oni ankaŭ povas reguligi la flukvanton trapasantan. Jen vere ekonomia kaj praktika eltrovo sub tiamaj materialaj kaj teknikaj kondiĉoj!

Sed tiu akvoutiliga konstruo vitale grava por la loĝantaro de la 14 gubernioj en la ebena de la okcidenta Siĉuan ne povis ĉiam plene manifesti ĝian utilon dum la epoko de feŭda regado en malnova Ĉinio. En la tempo kiam la lando estis misregata, la kanaloj de la irigacia konstruo ofte estis detruitaj kaj fiaj oficistoj, bienuloj kaj lokaj despotoj ĉantaĝadis kamparanojn per preteksto de jara riparo de la barajo, sed fakte la riparo estis nur fuŝe farita. Tial pli kaj pli difektiĝis la konstruo, reduktiĝis la irigaciata areo kaj pli graviĝis la damaĝoj de naturaj katastrofoj. En 1947 je la fino de la kuomintang-a regado nur en unu fojo la agroj en dekkelkaj gubernioj estis inunditaj kaj pli ol cent mil personoj suferis la katastrofon. En la antaŭvespero de la Liberiĝo de Siĉuan-provinco la irigaciata areo jam malpliĝis ĝis apenaŭ 130,000 hektaroj dume la plagata areo pliiĝis ĝis pli ol 90,000 hektaroj.

Post la Liberiĝo Dugiang-barajo reakiris sian junecon. La riparado estis bone plenumita. La nombroj de faritaj bambuaj korboj, *maĉaoj*, fostoj kaj tertransportado nur de 1950 ĝis 1953 jam superis la tutan sumon faritan dum la 30 jaroj de reakcia regado. Krome estis farita ankaŭ serio da ekspansiaj laboroj. Iuj barajoj fariĝis jam novtipaj konstruoj renovigitaj



Fejŝa-barajo, unu el la ĉefaj konstruaĵoj de Dugiang-barajo.

Foto de Hinhua

per cemento. Stariĝis sur multaj ĉefaj kanalbranĉoj modernaj kluzoj. Irigaciata areo plivastiĝis ĝis 440,000 hektaroj t.e. duoblo de tiu en pasinteco. Tio ne nur grandigis la regionon profitantan de la konstruo de 14 ĝis 25 gubernioj kaj urboj sed ankaŭ kreis favorajn kondiĉojn por provizi akvon al la lokaj industrioj, por malfermi novajn navigaciajn vojojn kaj por konstrui hidroelektrajn staciojn.

Dugiang-barajo, la konstruo devenanta de antaŭ 2200 jaroj, ne nur rejuniĝis; sed fariĝis eĉ pli bela kaj pli ĉarma.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

La Tutlanda Konkurso por Tablotenisa Ĉampioneco

Ne tre longe post la 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro de Tabloteniso en Pekino, okazis en Tajjuan, la provinca ĉefurbo de Ŝanhi, ekde la 16-a ĝis la 29-a de septembro la Tutlanda Konkurso por Tablotenisa Ĉampioneco de Ĉinio en 1961. La konkursado de la 315 getablotenisistoj kaj 90 tablotenisaj teamoj dum la 14 tagoj respegulis la novajn trajtojn de la senĉese disvolviĝanta tablotenisa sporto en Ĉinio. Multaj eminentaj sportistoj de la 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro estas venkitaj de novuloj. Ek-

zemple, ambaŭ Ĝuang Zedong, la monda ĉampiono de vira individua konkurso, kaj Kiu Ĝonghuj, la monda ĉampiono de virina individua konkurso, estis foje venkitaj de novuloj. Rezulte de la konkursado, la Unua Teamo de Ŝanhajo konsistanta el la tablotenisistoj Li Fujong, Hju Jinŝeng, Ĝang Hjelin gajnis la ĉampionecon de vira kolektiva konkursado kaj la freŝforta trupo, la Unua Teamo de Hejlonggiang, konsistanta el la sportistinoj Han Juĝen, Hu Ŝujun kaj Caŭ Muven gajnis la ĉampionecon de virina kolektiva konkursado. La gajnintoj de la ceteraj 5 ĉampionecoj listiĝas jene:

Vira individua konkurso:

Ĉampiono — Li Fujong,

Subĉampiono — Hju Jinŝeng

Virina individua konkurso:

Ĉampiono — Kiu Ĝonghuj,

Subĉampiono — Lin Hujking

Vira duopa konkurso:

Ĉampiono — Ĝuang Zedong

kaj Li Fujong

Subĉampiono — Ĝang Hjel-

ling kaj Su Guohi

Virina duopa konkurso:

Ĉampiono — Kiu Ĝong Huj

kaj Vang Gian

Subĉampiono — Ĝeng Minĝi

kaj Lin Himeng

Ambaŭseksa duopa konkurso:

Ĉampiono — Li Fujong kaj

Han Juĝen

Subĉampiono — Su Guohi

kaj Hiaŭ Gieven

Sur Nia Librobreto

Junulara Kantareto —

kompilita de Josef Ĉink, eldonita de Esperanto-rondeto ĉe Kulturdomo de ROH en Ostrava — Peruba, Ĉeĥoslovakio. Formato: 14 × 20 cm. 48 p. Prezo: 5 rkp. La 8 esperantaj kantoj inkluzive de *La Tagiĝo* kaj 46 aliaj tradukitaj popularaj kantoj el pli ol 10 landoj faras la kantarono taŭga ilo por vigligi E-rondojn aŭ unuopajn esperantistojn. Preso mimeografia, tamen sufiĉe klara; papero bona; preseraroj nemultaj. Libreto rekomendinda.

V. K.

Terminaro por Infanludoj, Muzika Terminaro, Kudra kaj Trika Terminaro kaj Radio-

terminaro — jen kvar malnovaj terminaroj reeldonitaj de la Esperanto Press en Kanado. Ilin bonvenigas certe multaj esperantistoj, kiuj volas apliki la lingvon en la koncernaj fakoj.

Mi ofte aŭdis plendon de fakaj esperantistoj, ke tre malmulta estas faka literaturo en Esperanto, des pli malmultaj estas tiaj vortaroj kaj terminaroj. Tio multe malhelpas la disvastiĝon de Esperanto en praktikaj sferoj. Tial mi ankaŭ ofte miras, kial oni apenaŭ povas kolekti 20 tiajn terminarojn aŭ fakajn vortarojn en ĉiuj nunaj libroservoj kvankam oni ofte propagandas, ke jam pli ol cent fakaj terminaroj aŭ vortaroj aperis en Esperanto. “Krei ĉiam la novajn kaj forgesi la heredindajn” versaĵne fariĝis jam

preskaŭ malbona tradicio en la esperanta eldon-rondo. Kiom da utilaj kaj valoraj esperantaj eldonaĵoj restas nur en la listoj de propagandaj pamfletoj kaj estas tute ne akireblaj por la nova esprantista generacio! La represo de tiuj kvar terminaroj do estas ne nur aprobinda sed ankaŭ imitinda ekzemplo por esperantistoj-eldonistoj.

H. F.

Litova-Esperanta Vortaro (Lietuviu-Esperanto Kalbu Vodynelis) 99 p., formato: 16 × 13 cm., prezo: 23 kop. (laŭ nova valoro), kompilita de St. Sabalis, eldonis Profluidykla, Vilnius, en 1960, enhavanta ĉ. 5000 vortojn. Estas enmetita ankaŭ simpla klarigo de esperanta gramatiko.




Fablo-poemoj

S. J. Zee:

Antaŭjuĝo

Unu tagon perdis hom' hakilon
Kaj suspektis la najbaran filon.
Baldaŭ la ŝteliston supozitan
Li renkontis ĉe la stratangulo.
Kian aŭdaculon hipokritan
Trovis li en tiu ĉi junulo!
Li afektis senkulpan aspekton
Antaŭ l' posedinto de l' hakilo,
Sed ĉio konfirmis la suspekton:
La rigardo, diroj kaj la iro.
Tamen li retrovis ĝin subite
Iutage en fosaj' ĝardena,
Kie li forgesis ĉe l' mateno
Kaj la herboj kaŝis ĝin perfide.
Morgaŭ li revidis lin survoje
Per hazardo, sed ĉitiufoje
Ĉio ŝajnis al li jam honesto:
La rigardo, iro, eĉ — la vesto!

El "Ljuŝi Ĉunkiu"




S. J. Zee:

La Vulpo kaj la Tigro

Tigro vagiris por elĉaso de viando
Kaj en ruzega vulpo ĉe arbara rando
Trovis viktimon.
“Evitu krimon!”
Parolis la fripono
En ton' de gravpersono.
“Dio min faris reĝo de la
Grandregno de popolo fela,
Se vi difektus al mi eĉ hareron.
Vi tiros al vi la dian koleron!
Kiel? Vi ne kredas?
Nu, jam post mi venu
Kaj atenton prenu,
Ĉu ne al mi vojon cedas
Ĉiuj bestoj de l' arbaro!”
Konsentis tigr' sen kontraŭstaro
Kaj iris post la grandvostulo.
Kiam la arbaranoj vidis
Ilin venantaj, jam rapidis
Ĉiuj sin savi per diskuro.

El "Kroniko de Militantaj Regnoj"



Esperanto Marŝas

Esperanto—Dua Fremda Lingvo en Pekina Fremdlingva Kolegio

La Pekina Fremdlingva Kolegio estas unu el la ŝtataj altaj lernejoj, kiuj edukas instruistojn, laborantojn de diversaj fremdaj lingvoj. Ekde la kuranta lernojaro ankaŭ Esperanto estas envicigita en la lernobjektoj de tiu ĉi Kolegio. Ĝi estas instruata kiel dua fremda lingvo al studentoj, kiuj ĝin elektis, kaj la kurso daŭros du jarojn.

Esperanto en La Danaj Lernejoj

Laŭ la nova, ĵus akceptita instruprograme de la Ministerio de Edukado de Danlando, ekde tiu ĉi jaro la Internacia Lingvo Esperanto fariĝis libervola instruobjekto en la oka kaj naŭa klasoj de ĉiuj danaj lernejoj, kiel

ankaŭ en ĉiuj vesperlernejoj. En pluraj lernejoj la instruado jam komenciĝis.

Okaze de la Universala Esperanto-Kongreso, okazinta komence de aŭgusto de tiu ĉi jaro en Harrogate (Britujo), aparta komisiono pritraktis la demandon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj. Oni konstatis, ke dum la lastaj kvar jaroj en multaj landoj Esperanto estas enkondukitita en la lernejojn kiel deviga aŭ libervola objekto. Statistiko, farita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono, montris ke, post la vastigo de instruado de Esperanto en la lernejoj de Pollando, la Internacia Lingvo estas instruata en ĉirkaŭ 600 lernejoj kaj Universitatoj de 27 landoj al ĉirkaŭ 20,000 gelernantoj. La nova instruprograme en Danlando sendube konsiderinde altigos la nombron de lernejoj, en kiuj la lingvo estas instruata.

IGS./451

Sukcesplena E-tendaro en Litova SSR

En litova regiona urbo Moletai, proksime al Vilnius, dum la unuaj dek tagoj de aŭgusto regis vera animo de Esperantujo. Ĉi tie okazis la ĉiujara Esperanto-tendaro de la estonaj, latvaj kaj litovaj gestudentoj-esperantistoj. Kiel gastoj estis ĉe ni gesamideanoj el aliaj sovetiaj urboj: el Moskvo, Rostov-Don, Leningrad, Taŝkent, Kiŝinev, Voronej kaj aliaj, sed precipe ĝojigis nin la alveno de malproksimaj siberiaj gastoj, profesoro Kulikov el Omsk kaj juna instruisto S. Kotljarov el Kemerovo. Ili veturis pli ol 3000 km por partopreni nian tendaron kaj la entuziasmo de niaj gastoj multe helpis por kreio de vera Esperantujo. Entute la nombro de partoprenantoj estis 193 (el Litovio 62, el Estonio 50, el Latvio 31, el Moskvo 23 homoj, entute el pli ol 40 lokoj).

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

La Unua Ŝako-konkurso de Virinoj

La ŝako-sporto pli kaj pli disvolviĝas en Ĉinio. Sed en la pasinteco ĝin partoprenis nur viroj. Ekde la 26-a de julio en la kuranta jaro, okazis en Ŝanhajo la Unua Virina Konkurso de Ĉina Ŝako. Inter la partoprenintaj ŝakistinoj estis laboristinoj, studentinoj kaj instruistinoj. Inter 10 sportistinoj okazis 90 maĉoj dum 20 tagoj, rezulte la 26-jara

laboristino Ŝu Fangjun gajnis la ĉampionecon.

“Ranidoj Serĉas Panjon” Premiita en la Filmo-festivalo ĉe Lugano

La pentraj-filmo “Ranidoj Serĉas Panjon”, pri kiu ni raportis sur p. 196 en la 4-a numero de EPĈ, gajnis premion de Arĝenta Velo en la 14-a Internacia Filmo-festivalo ĉe Lugano, Svisio.

Ebura Gravuraĵo pri la Longa Marŝo

Post dujara prilaborado, la fama veterana ebur-gravuristo de Pekino s-ro Jang Ŝihuj k.a. finfaris grandtipan eburan gravuraĵon pri la Longa Marŝo, kies gravajn epizodojn kaj batalojn ĝi prezentas, ekzemple la sagacan konkeron de Ĝinŝa-rivero, la trapason de la marĉa herbejo ktp. Por tiu gravuraĵo oni uzis eburon du metrojn longan kaj pezan je 49 kg.

La pasintjaran tendaron en Estonio partoprenis 104 homoj.

Post la laborkunvenoj kaj lekcionoj de la Somera Universitato, de diversaj fakrondoj kaj ekskursoj ĉiuvespere okazis koncertoj, kie prezentis sian arton la latvaj, estonaj, rusaj kaj litovaj amikoj. Por helpi la komencantajn junesperantistojn oni organizis al ili rektmetodan kurson sub sperta gvidado de konata estona esp. — instruisto A. Siitam. Post fino de tiu rapida kurso estiĝis multaj kuraĝaj novaj parolantoj. Dum la lekcionoj de la Somera Universitato oni pritraktis diversajn temojn el plej malsamaj fakoj de vivo kaj scienco, dum laborkunvenoj ni diskutis pri la instruaj, organizaj kaj aliaj temoj, kiuj interesas nian junularon. Ĉiuj paroloj, diskutoj, prezentadoj kaj ĉiutagaj interrilatoj estis nur en Esperanto, kaj post la ioma hezitemo en unuaj tagoj baldaŭ ĉiuj flue esprimis siajn pensojn.

Al nia brava, heroa kosmonaŭto German Titov ni sendis esperantlingvan salutleteron, ĉar lia senprecedenca flugo okazis dum nia tendara tempo kaj en komuna ĝojo ligis niajn 11 naciojn, havantajn komunan lingvon.

Kun konsento de la loka komitato de la Komunista Partio ni organizis en fino de la tendaro komunan festvesperon kun plena programo al la loĝantaro de Moletai. Ĝin partoprenis reprezentantoj de la loka organizaĵo de la Komunista Partio kaj plene ga salono da urbanoj. Kun granda atento ili aŭskultis la klarigan prelegon pri Esperanto kaj varme akceptis niajn esperantlingvajn prezentaĵojn. Inter la loĝantaro vekigis serioza intereso al nia lingvo.

Al ni la dek tagoj en Moletai estis mallongaj kvazaŭ sonĝo. Ni disiris plenaj je deziro labori pli sindone por nia vere amikiga lingvo kaj venontjare denove renkontiĝi en Latvio. Nia malproksima gasto el Omsk, profesoro Kulikov diris dum adiaŭo: "Mi

ne bedaŭras, ke mi veturis la longan vojon. Mi pasigis dek mirindajn tagojn en Esperantujo."

Johannes Palu (Tallinn, Estonio, USSR.)

Bulgaraj Esperantistoj en Odessa

De la 9-a ĝis la 11-a de junio pli ol cent bulgaroj vizitis la urbon Odessa. Inter ili preskaŭ kvindek esperantistoj inkluzive tri membrojn de la C. K. de



Bulgara Esperantista Asocio (BEA) Korucin, Lakova kaj Triĉkov, estrojn de la Esperanta Kooperativo — Ĉifuda (prezidanto) kaj Conkovski, korektiston de la *Bulgara Esperantisto*, — Georgievo, sekretarion de Esp. Societo "Sukceso", Poŝtrapanski kaj aliajn.

Nur tri tagojn gastis la bulgaraj amikoj en Odessa. Sed la multaj agrablaj renkontiĝoj, konversacioj, fotografadoj kaj kunestadoj en kafejoj longe restos en la memoro de ni ĉiuj.

N. I. Sigol-Podolskij (Sovetunio)

E-libroj Konfiskitaj de Hitler-reĝimo Retrovitaj

Ĉirkaŭ 2000 esperantaj libroj de la antaŭa, famekonata Germana Esperanto Instituto en Leipzig konfiskitaj dum la Hitler-periodo estas retrovitaj kaj nun troviĝas en la Germana Ŝtata Biblioteko Berlin, GDR, Unter den Linden 8.

Por la festo de la 300-jara datreveno de la fondiĝo de la Ŝtata Biblioteko la 23-28an de oktobro la libroj estos aranĝataj en nove pretigita librotenejo, kaj ili estos tiam denove alireblaj por la esperantista publiko, dum samtempe la kolektado de Esperanto-libroj estos daŭrigata.

Karl Maier (G.D.R.)

Forpasis D-ro Georg Soergel de G.D.R.

Unu el la plej elstaraj esperantistoj en G.D.R., profesoro d-ro Georg Soergel mortis la 12an de julio per akcidento en sia 50-jaraĝo. Li estis nelacigebla laboranto por nia kara lingvo kaj granda admiranto de la ĉina popolo, kun kiu li amikiĝis dum sia vojaĝo tra Ĉinio antaŭ ĉirkaŭ 5 jaroj.

Karl Maier (G.D.R.)

Somera E-tendaro en Ĉeĥoslovakio

En Ĉeĥoslovakio okazis jam tradicia Somera Esperanto Tendaro de la 16-a de julio ĝis la 12-a de aŭgusto 1961, en du sinsekvaj dusemajnaj etapoj. Aranĝanto estis Esperanto Klubo ĉe Domo de Kulturo en Trebiĉ (Moravio) — La proksimume 150 partoprenantoj, plejparte gejunuloj, (en kvar diversaj kursoj) ĉiuj ricevis la diplomojn post la sukcesaj ekzamenoj. La instruado okazis en naturo ĉe la akvobaraĵo de Vranov. Antaŭtagmeze okazis 4-6 horoj de esp-gramatiko, historio, literaturo kaj konversacio; posttagmeze diversaj ludoj, bano kaj ekskursoj.



Deziras Korespondi

* **En kio estas Felico?** Ĉiuj s-anoj tutmonde estas petataj respondi per propra opinio, eventoj el la vivo, nac. proverboj, legendoj, sentencoj ktp. por helpi al mia skriblaboro (libro) laŭ adr: **Oskar Gardi, str. Ŝkolnaja 2, kv. 18, Leningrad-P-183, Sovetunio.** Rekompece mi tuj sendos: IPK, PM, vidaĵojn, k.a. laŭ deziro. Anticipe dankon.

* **Minista Esperanto Rondo,** Varpalota, Hungario, kolektas esp-ajn k nacilingvajn gazetojn, librojn, prospektojn, pm, glumar-kajn, alumetetikadojn, uzitajn fervojo — k ŝipo-biletojn, il. pk pri urboj, pejzaĝoj, naciaj kostumoj k pri la arto de Ĉinio.

* **Alois Postl,** Kapfenberg, Lager Redfeld B. 12, OK. Stelmark Aŭstrio. kun aziaj naturistoj.

* **Hristo Metchev,** kompl. "Lenin", bloko 21, vh. "B", Sofio, Bulgario (instruisto de politika ekonomio) kun P.R. Ĉinio, P.R. Koreio, D.R. Vietnamio k.a. landoj pri polit. ekonomio, politika k kultura vivo, literaturo, muziko, laborista movado, geologio k historio, kaj interes. esp-ajojn, pki, revuoj k pm.

* **Ivan Ĉernaev,** Bulgario, Sliven, Sofio-1, interes. esp-ajojn kun juristoj, turistoj k abelkulturistoj.

* **Ivan Nikolov Bajčev,** (25j instruisto) kun tuta mondo precipe kun okcidentaj landoj pri muziko, ĝazmuziko k interes. pm, 1, ktp. Bulgario, Ruse, str. Jakoruda 8-A.

* **Matjo Mateev Nedelčev** (esp-isto de 1936, 40j. Ĉefkontisto en koop.) kun ĉl pri ĉt. Resp. nepre sekvos. adr: vilaĝo Drenovez, regiono Rozgrad, Bulg.

* **Vasil Petrov Gazinčev** (ligno-skulptisto) vil. Batak, distrikto de Pazarĝik, Bulg. kun ĉl pri ĉt.

* **Atanas N. Ĉolakov, Nikola G. Ralev, Vasil A. Arizanov,** (lernantoj) Batak, Pazarĝiŝko, Bulg. kun ĉl pri ĉt.

* **Dimităr Bojinov Bârzakov** (lernanto) Teĥnikum po gorska promiŝlenost, Batak, Pazarĝiŝko, Bulg. kun ĉl pri ĉt.

* **Angel Jv. Dopčev** (lernanto) Teknikum po gorska promiŝlenost, Batak, Pazarĝiŝko, Bulg. kun ĉl pri ĉt.

* **Konstantin Mikulič,** Vajanského 329, Malacky ĈSSR, Eŭropo. kun maljunaj esp-istoj el Ĉinio, Kalifonia, Hungario, Cuba, DDR, Francio, Brazilo per Pl.

* **H. Duschek** (apotekistino), **Neumann** (apoteko-asistantino), **Sieber** (apoteko-helpantino) **Kirschgens** (apoteko-lernantino) Adr. komuna:

Radebeul Gellertstrasse 18 (apoteko) DDR., serĉas korespondantojn.

* **Asao Sumimoto** (15j. lernanto) Nisi Iho-cho, Takasago, Jap.

* **Hisako Fukuda** (17j. lernantino) Mitani 3574 Inami-cho Kako-cun Hjogoken, Jap.

* **Yukiko Irie** (18j, oficistino) 226-2 Iho-cho, Takasago, Jap.

* **Mieko Yamoto** (13j. lernantino) 54-3 Macunamicho Takasago, Jap.

* **Mičiko Kuraku** (13j. lernantino) 532 Imazu-cho Takasago, Jap.

* **Secuko Hayaŝi** (13j. lernantino) 32-3 Macunami-cho, Takasago, Jap.

* **Yosijasu Sasaki** (17j. laboristo aŭtomobil-fabriko) Shimizu-cho 1433, Takasago, Jap.

* **Tamocu Miyamori** (17p. lernanto) 1119, Uohashi Amida, Takasago, Jap. k interes. pm bk.

* **Yoŝihisa Hamatani** (20j. oficisto) 227 Ihozaki Iho-cho, Takasago, Jap.

* **Masaharu Terawaki** (19j. oficisto) Higashi-Hiracu Yoneda, Kakogawa Jap.

* **Norikazu Hamatani** (27j. oficisto) Takasu, Iho-cho, Takasago, Jap.

* **Kanji Kasimoto** (20j.) 2 ĉhome Nishonmaci Wakamatu-si, Fukuokaken, Jap.

* **Walczak Ryszard,** Bydgoszcz, ul. 3 Maja 5m5 dez. kor. kun amikoj el orientaj landoj k Aŭstralio k interes. pm, alumetetikadojn, pki (18j. studento) Pollando.

La tendaron vizitis gesamideanoj el Hungarujo kaj Polujo.

Lado Bala, Ĉeĥoslovakio

Renkontiĝo de Hungaraj Esperantistoj

La 16-17 de septembro en Pécs la hungaraj esperantistoj aranĝis tutlandan renkontiĝon. En sunbrilaj somerfinaj tagoj kunvenis proksimume 400 geesperantistoj. En Pécs dum la festvespermanĝo en la eleganta restoracio "Olympia" diris salutparolon la sekretario de Hungarlanda Esperanto

Asocio: Papp Zsigmond kaj aliaj personoj de la loka urba kaj faksindikata gvidantaro.

Dimanĉe matene la ĉeestantoj faris rondvojaĝon en la urbo per aŭtobuso. Oni vizitis la faman montaron Mecsek, kaj la historiajn memorajojn en la urbo. Dum la tagmezmanĝo denove en la sama restoracio, samideanino Borbála Szerémi vicprezidanto de HEA, prezidanto de Internacia Esperantista Virina Komitato salutis la gesamideanojn kaj disdonis donacojn, silkajn ŝultrotukojn, por la geaktivuloj. La renkon-

tiĝon partoprenis 22 polaj kaj bulgaraj gesamideanoj. Dimanĉe posttagmeze la gvidantaro havis oficialan kunsidon, kie la ĉeestintoj faris raportojn kaj proponojn.

Julio Baghy Gvidas Novan Kurson

La 22-an de septembro en la gimnazio "kossuth Zsuzsanna" la Budapeŝta Departementa Komitato, pcre de la Hungara Pedagogia Sindikato komencis Esperantokurson, kies gvidanto estas Julio Baghy.

3 Serioj da Ĉinaj Poŝtmarkoj Nove Eldonitaj



La 45-a serio de poŝtmarkoj kun 2 intajle 3-koloraj pecoj speciale emisiita (1-8-1961) por la Ĉina Popola Revolucia Milita Muzeo.

La 88-a serio de poŝtmarkoj kun 5 intajle 3-koloraj pecoj emisiita (1-7-1961) de Ĉinio por memorigi la 40-an fondiĝan datrevenon de la Komunista Partio de Ĉinio.

La sidejo de la Unua Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio (en Ŝanhajo. Bildo purpure presita)

1-287 4c.

La Domo "Aŭgusto-1" en Nanĉang (Bildo verde presita) 2-288 8c.

La Provizora Registaro de la Ĉina Soveta Respubliko en Ĵujin de Gianghi-provinco (Bilde brune presita)

3-289 10c.

La Monto "Trezora Pagodo" en Jan'an (Bildo blue presita)





4-290 20c.

La Ĉielpaca Pordego de Pekino (Bildo ruĝe presita) 5-291 30c.

La 89-a serio de poŝtmarkoj kun 2 intajle plurkoloraj pecoj emisiita (11-7-1961) por memorigi la 40-an datrevenon de la Popola Revolucio de Mongolio.

La naciflagoj de Ĉinio kaj Mongolio 1-292 8c.

La Centra Registaro de la Mongola Popola Respubliko 2-293 10c.



INDEKSO DE EPĈ 1961

(La titoloj kun “*” estas informoj el “Kurantaj Aferoj” kaj tiuj kun “▲” estas bild-serioj.)

POLITIKO:

Rememoro pri intervjuo kun Prezidanto Maŭ Zedong pri papertigro	60
Granda venko de la demokratia reformo en Tibeto	161
Provaj demokratiaj elektoj en Tibeto jam deciditaj	285

EKONOMIA KONSTRUADO:

Rondiro tra la Tutlanda Agrikultura Ekspozicio	4
Abundproduktaj areoj — prototipo de moderna ĉina agrikulturo	10
Pompas ĉie ruĝaj floroj	12
* Agrara reformo efektiviĝis en Tibeto	19
Kion ili faris por ŝtalo	34
* Nova progreso de “konstrubloka” ilmaŝino	48
▲ La fabriko venas helpi la kamparan popol-komunumon	52
Fabriko kiu helpas la agrikulturon	57
* Grandnombro da kadroj helpas agrikulturan produktadon	92
Agrikulturo — bazo de la nacia ekonomio	103
Bonkvalita kaj multspeca	159
Plago sen malsato	163
Antikva bataalkampo transformita en grandan fruktoĝardenon	213
Post pluvo	226
Sub la ŝakto	259
Vizito al Huahian-a Farmejo de Revenintaj Ĉinaj Elmigrintoj	262

KULTURO, EDUKADO:

* La popola universitato en Vanjong-gubernio	19
* Unua manuskripto de “Historio de la Han-a Lingvo”	19
Elstara ĝardenisto laborema	20
* Ĉie floras popolaj elementaj lernejoj en Tibeto	48
Biblioteko en la popolamason	122
Libroj	124
* Jam aperis la anglalingva tradukajo de la 4-a volumo de la “Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong”	146
* Ĝenerala vigliĝo de sciencaj studoj en Ĉinio	187
* Kulturaj kaj historiaj objektoj kaj lokoj de Tibeto sub bona prizorgado	205
* Kolekto de faksimiloj de ĉina gravura presarto	205
▲ Kinghua-universitato	210, 255
Altgrada eduko en nova Ĉinio	211
* “Senpatra” bufino naskis idojn	235
* Nova eldono de la 24 historioj laŭdinastiaj de Ĉinio en preparado	237

* Eksterlandaj famaj verkoj en Ĉinio	285
La Muzeo de Lusin en Pekino	288
* Prelegado de diversaj skoloj de ĉina medicino	295
* Vortordiga sistemo de ĉinaj ideografiaĵoj	295

LITERATURO, ARTO:

▲ Brila belo el la ĉiziloj de novĉiniaj skulptistoj	2
* “Je la nomo de Revolucio”	19
Patrino kaj filino	22
Mangajon onjo sendas al la sudmonteto (popolkanto)	23
Ke brile grasu ĉiu porko (popolkanto)	25
Monto-translokigo (popolkanto)	26
Neeblas trapas’ sen elektro-livero (popolkanto)	26
Brilaj sukcesoj de la ĉina skulptarto	30
Riĉaj literaturaĵoj de la naciaj malplimultoĵoj en Junnan-provinco	37
Zong Laŭlu (popolrakonto)	41
La nova filmo “Nie Er”	42
* Stereokopa filmo projekciebla en ordinaraj kinejoj	48
La tero patria printempas bril-brile	51
▲ Viglas la skulptiloj de novĉiniaj skulptistoj (popolkanto)	71
Potenco de onidiro (fablopoemo)	79
La serĉanto de perdita spado (fablopoemo)	79
Ĉevalkapa liuto (mongola (popolrakonto)	86
Ekspozicio de laborista arto	90
Dingbo kaptis fantomon	93
Pri “Ĉina Antologio 1949-1959”	97
La sofisto (fablopoemo)	125
Memorigo pri dek majstraj pentristoj de antikva Ĉinio	126
Kaŝeblas ja ne lup’ kruela (poemo)	137
Revolucia familio	138
La neganteblaj manoj (novelo)	140
Arakis’ bongusta en la kampa grundo (popolkanto)	141
Sed por ni mem ni plugas nur hodiaŭ (popolkanto)	141
Jam elkreskas bambuidoĵoj de l’ kuranta jaro	144
* Rakontoj pri fantom-spitantoj	149
La magia lagenario (popolrakonto)	149
Vizito al la urbo (novelo)	173
Ni ne plu estos trompitaĵoj	177
La popolkomunumo — grandega familio (popolkanto)	184
Lagenari’ trezora (popolkanto)	187
Sur la step’ leviĝas nun la eterne brila sun’ (kanto kun muziko)	188
Ŝtona skulptaĵo “Inter-sopirantaj kokoj”	194
Afrikaj proverboj	195

Ĉinstilaj pentraĵoj viviĝas sur ekran	196
Venas la floranta epoko de la naciaj lingvoj	200
La lasta aspiro de la partizano (<i>poemo</i>)	203
* Kolekto de manuskriptoj de Lusin	205
* Stereofilmo elburĝoniĝas	205
Prezidanto Maŭ nin gvidas en la paradizon (<i>popolkanto</i>)	223
Riĉrikolta himno tondre sononas tra la val' de Lancang-rivero (<i>popolkanto</i>)	229
Muso kaj kato (<i>fablo</i>)	229
* Artaj ekspozicioj en Pekino	230
Homo kaj trezoro (<i>eseo</i>)	230
▲ Tri pentristoj, tri stiloj	231
Pineto (<i>eseo</i>)	236
"Astero" — fabela filmo	238
La Ĉina Infana Teatro	240
La sepa feino venis al la homa mondo	244
"Blankkapa maljunulo" (<i>fablo</i>)	247
Nokto sur la monto (<i>poemo</i>)	247
Literaturo pri fantomoj	250
* Filmo pri ĉinaj tradiciaj luksartoj	253
Brila arto, senmorta figuro—Mej Lanfang sur la sceno	258
Popola komunumo estas feliĉ-floro (<i>popolkanto</i>)	261
Lusin kaj V. Eroŝenko	264
Himno de nokto	267
Batalanto kaj muŝoj	268
Funebro pri k-do Mej Lanfang — majstro de la pekina opero	268
La majoro en trajno (<i>novelo</i>)	272
Ter-akto (<i>popolkanto</i>)	274
Somero de la muziko	278
Arde prikantanto de l' nova vivo	280
▲ Pentraĵoj de Ŝaŭ Ju	281
Granda kaj malgranda vorto (<i>antikva fablo</i>)	287
Plej sekura gardado (<i>antikva fablo</i>)	287
Ŝi motormelodion ŝatas, aŭskultadas (<i>popolkanto</i>)	289
"Interrompita am-songo"	290
Rakontoj pri Afanti (<i>popolrakonto</i>)	291
Plej sinceraj la versetoj pri la verdaj revuetoj (<i>poemo</i>)	292
Ĝong Kuj en la ĉinaj pentraĵoj	293
* Rememorigo pri Lusin	297
La vulpo kaj la tigro (<i>fablopoemo</i>)	299
Antaŭjuĝo (<i>fablopoemo</i>)	299
* Ebura gravuraĵo pri la Longa Marŝo	300
* "Ranidoj serĉas panjon" premiita en la Filmofestivalo ĉe Lugano	300

POPOLA VIVO:

Komuna manĝejo sub la lumo de la penso de Maŭ Zedong	16
Se ne ekzistus la popola komunumo	39
* Kunveno de budhistaj reprezentantoj en Tibeto	48
Unu tago ĉe la produktbrigado	67
Okulo de He Ŝanhua	70
Tra la mallumo antaŭ la tagiĝo	72

Ha, ter-atestilo	82
* 15-jara ĉampiono de ĉinŝako	92
▲ Vivaj fragmentoj en la kampara popola komunumo	99
La Pekina Laborista Sporthalo	114
Tablotenisa sporto en Ĉinio	116
Mi fariĝis modelo de metilernanto	118
Sonrido de la novedzino	120
* "La unuaj" en Tibeto	123
Nova kanto pri Lhasa	134
La ĉasisto en arba oceano	185
Korbopilka teamo de popola komunumo	191
* Nova mond-rekordo de montgrimpistinoj	204
* Koncerto en ĉiu tago en Ŝanhajo	204
* Sezono de sportokonkursoj en Ĉinio	205
La semajnfino en la Ŝanhaja Laborista Kultura Palaco	224
Horloĝoj	228
* Tibetaj lamaoj pri religia libereco	235
* Novaj sportaj rekordoj	236
Travivaĵoj de du filmaktorinoj	237
Virina montgrimpa sporto en Ĉinio	246
* Ekspozicio de floroj	251
* Nova fizionomio de miljaraj kavernoj	253
Mi retrovis nian pliaĝan franjon	276
La sportoj ŝatataj de la mongola popolo	294
* La Tutlanda Konkurso por Tablotenisa Ĉampioneco	298
* La Unua Ŝako-konkurso de Virinoj	300

FUNDAMENTAJ SCIOJ:

Unu taso da bakita faruno	84
La Maj-kvara Movado kaj fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio	106
La Dua Enlanda Revolucia Milito	166
Ĝan Tianjoŭ	170
Duonvazo da salo	190
La grand-urskato	193
Trapaso tra la Miaŭ-regiono kun Prezidanto Maŭ	217
Ĝeng Ĉengong reprenis Tajvan	220
* Urbo antaŭ 3,500 jaroj	230
Ventumilo	242
Navigisto Ĝeng He	286
Dugiang-baraĵo	296

AMIKECO, PACO:

Antaŭenmarŝas tutmondaj popoloj	3
* Nova paĝo de amikeco inter Ĉinio kaj Kamboĝo	15
* Subteno al batalado de kongolanda popolo	36
* Aranĝo por plenumo de la Traktato pri la Problemo de Duobla Nacieco subskribita inter Ĉinio kaj Indonezio	45
* Traktato de Amikeco kaj Reciproka Neagreso inter Ĉinio kaj Afganio	45
▲ Brilas la amikeco inter Ĉinio kaj Birmo!	54

Ŝoseo de oro kaj arĝento	55
* Entuziasma celebrado de la 11-a datreveno de la subskribo de "la Ĉini-Sovetunia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo"	81
Venko apartenas al la revolucia kuba popolo	88
* Ĉio jam pretiĝos por la 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro de Tabloteniso	92
* Japanaj aktoroj lernis pekinan operon en Ĉinio	92
Ekstaru kaj venku mia nigra popolo (<i>poemo de Patrice Lumumba</i>)	94
Protesto kontraŭ la koloniistoj pro la murdo al Patrice Lumumba	94
Impreso pri Pekino	96
▲ La 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro de Tabloteniso	102,155
Ili vivas en amikeco	110
Saltas l' arto, pac' en svingo	113
Jarfina vespero neforgesebla	136
Fragmentaj interesajoj el la 26-a Ĉampionec-turniro de Tabloteniso	147
* Ŝenĝen-Rezervujo liveris akvon al Hongkong	149
La Ĉampionoj de 5 individuaj konkursoj	154

"Ni ĵuras defendi nian landon ĝis morto kaj ni certe venkos!"	176
Sur Lago Biŭa	178
Rememoro pri R. Tagore	181
* Memorigo pri la 25-jara datreveno de la forpaso de M. Gorkij	187
* Celebro de la centjaro de R. Tagore	204
La pluvo de ĉerizflora tempo	222
Mi vizitis Ĉinion	249

ESPERANTO, K.A.:

Vegetaĵoj sur la tegmento de la mondo	44
Esperanto marŝas	46, 98, 150, 198, 253, 300
Sur nia librobreto	49, 152, 201, 252, 299
Korespondi deziras	50, 93, 137, 153, 206, 247, 249, 302
Enigmoj	113, 199
For, kapitalisma Usono! (<i>poemo</i>)	115
▲ Poŝtmarkoj	133, 303
Homo ekflugis al Kosmo (<i>poemo</i>)	182
Analizemo (<i>Humoraĵo</i>)	192
Ĉio perfektas! gratulon! gloro! (<i>poemo</i>)	228

Nubmaro de Hua-monto →

JUS APERINTAJ

★ La Okcidenta Ĉambro

Bildorakonto kun konciza klarigo laŭ samtitola fama ĉina klasika literatura verko.

★ Karpetoj Transsaltis la Drakpordon

Multakolora presita bildolibro de nova legendo kun interesa teksto. Taŭgas por komencantoj kaj infanoj.

★ Knabino kaj Garolo

Bildolibro de popolrakonto pentrita de ĉina fama pentristo kaj multakolore presita.

★ Pejzaĝoj de Ĉinio

Albumo de ĉinaj pejzaĝoj en 48 fotoj, el ili 23 multakolore presitaj.

APERONTAJ



ANKORAŬ HAVEBLAJ

Verkoj de Maŭ Zedong

Praktiko
Pri Popoldemokratia Diktaturo
Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong

Literaturaj

Ĉina Antologio
Rakontoj pri Fantomspitantoj

Diversaj

Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko
Vivu Leninismo
Floroj kaj Birdoj

Mendu ĉe nia administracio aŭ niaj landaj perantoj





Ĉarmas la Montoj kaj Riveroj

Ligna gravuraĵo de Guo Ling